REGO

☆ RUSIA ESPERANTO-GAZETO ☆

movada revuo en kunlaboro kun REU *№ 2 (87) aprilo 2015*

en la numero

Ludmila Novikova: "Saluton, mia patrotero!"
MASI iĝis 20-jara
Tatjana Loskutova rakontas pri Brazilo
anoncoj pri la 28-a Konferenco de REU kaj la 102-a UK
E-centro en Orienteŭropa nacia universitato
fragmento el nova romano de Mikaelo Bronŝtejn

Moskvo, 2015

enhavo

01 Ludmila Novikova: “Saluton, mia patrotero!”

08 MASI iĝis 20-jara (I.Gonĉarova)

10 APERo-9 festas 20-jariĝon de MASI (I.Gonĉarova)

14 “Kristala revo” de nia juneco (T.Loskutova)

22 La 28-a Konferenco de REU

22 Seulo gastigos la 102-an UK

23 UEA serĉas novan Ĝeneralan Direktoron

24 La malfermo de E-centro en Orienteŭropa nacia universitato en Ukrainio

26 Statistiko pri UEA-membraro en 2014

27 “Mi stelojn jungis al revado...” (fragmento el nova romano de M.Bronŝtejn)

36 Ukrainia E-Asocio invitas al “Bukovina printempo”

37 Liboservo de UEA en 2014

39 Novaj versaĵoj de K.Ilutoviĉ

40 Fotoj el “la tempoj de glora SEJM”

k3 La 3-a Lingva Festivalo en Minsk (I.Gonĉarova)

k4 Jubileo de SEJM (D.Cibulevskij)

Ludmila Novikova

REGo

(Rusia Esperanto-Gazeto)

№ 2 (87) aprilo 2015

aperadas ekde 2000

redaktas **Georgij Kokolija**
kunredaktas **Viktor Aroloviĉ**
kunlaboras **Maksim Griŝin**

poŝta adreso: Pjatnickoje ŝosse 45 – 105
125310 Moskvo, Rusio
retadreso: gazeto@mail.ru

abontarifoj por 2015:

por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ – 680 rubloj, sendendaj al:
Коколия Георгий Владимирович
Пятницкое шоссе 45 – 105
125310 Москва

aŭ pagendaj al: 410011382499386
en la pagsistemo “Яндекс.Деньги”

por loĝantoj de aliaj landoj – 25 eŭroj pagendaj al la konto ***kklg-r*** *ĉe UEA*

elektronika abono *– 350 rub. (10 eŭr.)*

LUDMILA NOVIKOVA: “SALUTON, MIA PATROTERO!”

Ludmila Novikova – sovetia kaj rusia esperantistino kaj poetino – jam de jardekoj loĝas en Moskvo, sed en la 70-aj jaroj de la pasinta jarcento ŝi tre aktivis en la urala esperantista movado kaj lasis en ĝi spurojn, kies valoroj personeca kaj kultura ĝis nun rimarkeblas en ĉi tiu vasta aktivecregiono de esperantistoj. Ni prezentas al la legantoj de REGo intervjuon kun Ludmila Novikova, en kiu ŝi revenas en la epokon de la poststagnada revigliĝo de esperantistoj en Uralo kaj ne nur tie.

Ludmila, oni ĉiam scivolas pri la kaŭzoj, kiuj puŝas homojn eklerni Esperanton. Sed tre ofte ne eblas strikte formuli konkretajn kaŭzojn, ĉar evidente pli gravas emocioj venigantaj la homojn al nova lingva medio. Ni ne malobeu la tradicion, kaj mi petas vin rakonti, kiam kaj kie vi informiĝis pri Esperanto kaj kial vi tuj post la esperantistiĝo memvole rekrutiĝis al la vico de movadaj aktivuloj plenumintaj en tiuj jaroj ekskluzive gravan laboron per kaj por Esperanto?

Mi konatiĝis kun Esperanto neordinare. Tio okazis en 1972, kiam mi estis studentino de la filologia fakultato de la Pedagogia instituto en Ĉeljabinsk. La fakto mem de ekstudo de la lingvo estis sufiĉe kutima – mi foje tralegis anoncon en la Publika biblioteko pri nova kurso de Esperanto, kiun lanĉis la Ĉeljabinska E-klubo, kaj aniĝis al ĝi. Eksterordinara estis antaŭhistorio de tiu evento.

Jaron antaŭe mi estis atente aŭskultanta lekcion de nia instituta profesoro pri lingvistiko Lev Nikolajeviĉ Rinjkov, en kiu li interalie tuŝis la problemon de multlingveco kaj lingvaj baroj en la mondo. Li verŝajne uzis sian specifan delikatan humursenton, kiam li, rigardinte la ĉeestantajn studentojn, diris: “La problemo ĝis nun ne trovis sian definitivan solvon. Tamen mi certas, ke en tiu ĉi aŭditorio ĉeestas homo, kiu destinos sian vivon al solvado de la problemo, gravega por la homaro”.

Tiumomente kvazaŭ fulmo trais min: mi komprenis, ke tiu homo estas mi kaj neniu krome. Mi estis tiam 17-jara, kaj la tuthomara problemo estis ĝustatempa por mi, ĝi momente obsedis miajn cerbon kaj animon kaj, kiel evidentiĝis, por la tuta vivo.

Mi tiam senprokraste, ne aŭdinte pluajn vortojn de la profesoro, komencis serĉi solvon de la problemo, kaj mi trovis ĝin! Post la lekcio mi alkuris al Lev Nikolajeviĉ kun krio: "Mi trovis la solvon! Necesas rekonstrui la latinan lingvon, kiu ekde la antikva periodo iĝis fakte internacia kaj kies spuroj restis en ĉiuj eŭropaj lingvoj. En la nova varianto de la lingvo necesas konservi la latinan leksikon, sed plisimpligi ties gramatikon". La respondo de la profesoro iom malvervigis min. Li diris: "Via koncepto estas brila. Sed al mi ŝajnas, ke iu Zamenhof plifruis vin. Ĉu vi scias pri la lingvo Esperanto?"

Mi sciis tiam nek pri Zamenhof, nek pri Esperanto kaj eĉ ne imagis, kie mi povas trovi informon pri mia "rivalo" (mankis tiam Interreto!). Mi opiniis tiam, ke Esperanto estas ia transmara miraklo. Kiel mi eraris! La "miraklo" estis tute apude – la Ĉeljabinska klubo de esperantistoj! Pro la eraro mi perdis tutan jaron de mia membr-aĝo en nia movado.

Do, mi venis al Esperanto pere de mia revo, mia propra koncepto pri la universala lingvo – facila, bela, justa, kio feliĉe realiĝis en la lingvo de Zamenhof. Tial mi iĝis fidela adepto de la lingvo por ĉiam.

Malakito estas agrabla verdkolora mineralo. En Rusio ĝi estas elminigata en la Urala montaro. La esperantista klubo de Miass "Malakita Stelo" en la 70-aj jaroj fariĝis inter esperantistoj ne malpli populara ol la samnoma mineralo inter ŝatantoj de juvelaĵoj. Bonvolu rakonti pri la urbo kaj konigi faktojn el la historio de la klubo.

Mi naskiĝis en la negranda urala urbo Miass. Mi ĉiam estis certa kaj ne dubas pri tio ĝis nun, ke mia naskiĝtero estas la plej bela en la mondo. Oni nomas ĝin "Ora valo", "Urala Svislando", "Gema trezorejo de la mondo". "Ora valo" pro tio, ke apud la urbo ekde la 18-a jarcento abundis oraj minejoj; "Urala Svislando" – pro similaj pejzaĝoj ĉirkaŭ la urbo: montoj, kovritaj de pinaj arbaroj, nekalkulebla kvanto da lagoj kun purega akvo, inter kiuj plej famas la lago Turgojak, kiun oni taksas kiel la duan Bajkalon; "Gema trezorejo de la mondo" pro la fama Ilmena natura mineralogia rezervejo kaj muzeo de ĉiuj mineraloj, konataj al la homaro, kiujn kolektis en la sama loko – ĝuste en la Urala montaro apud Miass – la Mastrino de la Kupra Monto.

Tial estas komprenebla la nomo de Miassa klubo de esperantistoj – "Malakita Stelo". Kreo de la klubo en 1973 estis unu el la plej rimarkindaj eventoj de mia Esperanto-biografio. Mi faris tion kune kun mia amikino Vera Dobridina (nun Poliŝĉuk). Ĉefaj direktoj de la kluba agado estis informado de la urbanoj pri Esperanto kaj pri esperantistaj aranĝoj en Miass kaj en la Urala regiono (ni faris tion pere de lokaj ĵurnaloj kaj en prelegoj

pri Esperanto en lernejoj, bibliotekoj, uzinoj k.a.), instruado de Esperanto (regulaj kursoj) en kulturdomoj de Miass; partopreno en Volgo-Uralaj kaj tutlandaj aranĝoj de esperantistoj kaj organizado de tiaj aranĝoj en Miass. La plej rimarkindaj el la organizitaj de "Malakita Stelo" aranĝoj estis literatura-muzika konkurso "Liro" (1976-1981) kaj OrSEJT-19 (Orient-Sovetia Esperantista Junulara Tendaro) en 1977.

Aktivante inter uralaj esperantistoj vi kontaktis multajn interesajn homojn, el inter kiuj pluraj estis aŭ poste fariĝis steluloj en la landa kaj internacia movadoj. Kiujn vi volonte rememoras hodiaŭ retrorigardante en la jarojn de via juneco?

El la medio de uralaj esperantistoj, kiujn mi konis kaj kun kiuj kunagadis dum mia urala vivperiodo, mi memorfiksis multajn interesajn, talentajn kaj fidelajn al Esperanto personojn. Inter la unuaj estis miaj instruistoj, gvidantoj kaj ĝenerale pli spertaj kamaradoj, kiuj estis por mi modelaj esperantistoj: Vladislav Andrejev, Viktor Laptev, Vjaĉeslav Roĵdestvenskij (Ĉeljabinsk), Boris Kolker, Nina Cvileneva, Nina Korĵenevskaja (Ufa); mi ankaŭ kun plezuro rememoras miajn "samaĝulojn" laŭ membreco en E-agado: Vera Dobridina, Tatjana Koptjagina (Miass), Viktor Kudrjavcev (Sverdlovsk), Vladimir Opletajev, Aleksandr Kalaŝnikov, Diljara Mamedova (Surgut, Tjumenj, Tobolsk); ankaŭ miajn disĉiplojn: Aleksandr Knjazev, Vera Moŝkina, Ludmila Katajeva (nun Olifirova), Aleksej Fomin (Miass). Sendepende de la grandeco de ties kontribuo al nia agado ili ĉiuj restas por mi "steluloj", kiuj prilumis mian vivon per siaj brilaj talentoj, per siaj originalaj personecoj, per sia verva rilato al Esperanto. Ili estis kaj restas veraj "samideanoj" por mi.

la ĵurianoj en Liro-77:
Ludmila Novikova, Boris Kolker, Viktor Ilkajev

Via sukcesa projekto, kiun vi mem iniciatis, dorlotis kaj realigadis dum pluraj jaroj, estas la poezia konkurso "Liro". Ĝian gravan kulturan valoron kaj instigan forton en la agitado de kapablaj poeziemaj junaj esperantistoj ne eblas subtaksi. En la orienta landoparto ĝi estis fenomeno ek-

sterordinara, kiu rolis kvazaŭ libera Parnasa podio por kreemaj talentuloj. Kiel vi nun taksas tiun ĉi periodon de via agado? Ĉu vi ne opinias, ke poeziaj forumoj similaj al la konkurso "Liro" povas ankaŭ hodiaŭ inspiri poetojn al novaj verkoj pli intime familiarigante ilin kun poeziŝatanta publiko?

Kio koncernas "Liron", tiu projekto vere estis la plej kara por mi, kaj mi ĉiam bedaŭras, ke ĝi ne plu ekzistas (temas pri la kunesta aranĝo, sed ne pri nunforma "Liro" ĉe "La Ondo de Esperanto", kiam partoprenantoj scias nek la nomojn, nek la verkojn mem de siaj rivaloj kaj sekve ne ricevas tian sperton kaj plezuron, kiajn havis partoprenintoj kaj ĉeestintoj de niaj konkursoj). Dank' al ĝi mi mem iĝis adepto de poezia verkado kaj tradukado en Esperanto, same multaj el partoprenintoj de "Liroj" malkovris kaj pliperfektigis siajn kreajn talentojn en ĉi kampo. Certe, mi opinias, ke similaj Parnasaj forumoj estas bezonataj al la nuntempaj junaj esperantistoj, ĉar ili ne nur agitas personajn kapablojn, sed ankaŭ evoluigas la lingvon mem.

Liro-78: kantas grupo de miassanoj

Vi multe tradukas el la rusa lingvo kaj poeziajn kaj prozajn verkojn. Kiuj poetoj kaj verkistoj dank' al via tradukista laboro trovis legantojn en Esperantujo? Ĉu vi povas nomi propran tradukaĵon, pri kiu vi fieras?

Nun la plej ŝatata afero en mia Esperanto-vivo estas tradukado, plejparte poezia. El miaj prozaj tradukaĵoj meritas atenton nur tiu de "Fatalaj ovoj" de Miĥail Bulgakov, kiu estis dufoje publikigita. Mi povas citi jenajn miajn ŝatatajn poetojn, kiujn mi plej ofte tradukas: Anna Aĥmatova, Aleksandr Puŝkin, Miĥail Lermontov, Pjotr Jerŝov, Marina Cvetajeva, Aleksandr Blok, Sergej Jesenin, Konstantin Balmont, Bella Aĥmadulina, Samuil Marŝak. Laŭ propono de Mikaelo Bronŝtejn mi provis traduki poeziaĵojn de Iosif Brodskij, sed tio estis tro komplika tasko por mi, kvankam utila – dank' al la tradukado mi komprenis tion, kion mi ne vidis dum simpla le-

gado. Antaŭnelonge mi malkovris por mi rusan poeton de la 20-a jarcento Nikolaj Turoverov, kiu estis volontulo en la armeo de Kornilov dum la Civitana milito kaj poste elmigris el Rusio. Liaj poemoj estas saturitaj de lia granda amo al la patrotero kaj anima doloro pro ĝia perdo.

OrSEJT-19: B.Anoĥin, A.Aleksandrov, V.Moŝkina, L.Novikova, L.Borisov

Mi neniam sentis fieron pro miaj tradukaĵoj: mi povas nur diri pri kontento aŭ malkontento pri la rezultoj de miaj kreaj penoj. Kaj eĉ tio, kio kontentigis min tuj post la traduko, ofte jam ne kontentigas post ioma tempo. Mi havas konstantan deziron ion korekti, redakti, plibonigi.

Mi povas uzi la vorton "fieras" nur koncerne mian aŭdacan projekton "Okcitanaj kantoj en Esperanto", kiu ŝajnis dekomence tute fantazia kaj kiu mirakle realiĝis (kun helpo de Dio certe). Mi konsideras ne nur la libron "Okcitanaj kantoj en Esperanto", eldonitan en la moskva eldonejo "Impeto", sed ankaŭ la muzikdiskon "Okcitanio" kun la kantoj de la fama sudfrancia bardo Patrik' (neesperantisto), plenumitaj de li mem en Esperanto. Tio estis mia granda atingo – ne nur iniciati, sed instigi la francojn partopreni en la projekto kaj plene efektivigi ĝin. Tio estis tute unika sperto por mi – tradukado de kantoj el la okcitana lingvo al Esperanto (kun helpo de la okcitana esperantisto Andre Andrieu [Andre' Andrijo'], kiu faris laŭvortajn tradukojn). Mi interniĝis en la nekonatan kulturon, kiu ravis min kaj iĝis proksima al mia animo. Certe, tiun traduklaboron prefere faru denaska portanto de la okcitana lingvo, sed inter la nunaj okcitanaj esperantistoj en Francio tiaj entuziasmuloj ne troviĝas.

Viaj originalaj poemoj aperas en diversaj Esperanto-revuoj kaj poeziaj kolektoj. Ĉu vi memoras vian unuan poemon en Esperanto? Kiuj temoj, problemoj kaj emocioj katenas vin kiel poeton tiel forte, ke ili fine nepre transformiĝas en versajn liniojn?

Mia unua originala poemo en Esperanto estas “Diverslingvaj koroj” (1975). Laŭ poetiko ĝi estas malperfekta (malpuraj rimoj), sed al mi plaĉas la metaforo “diverslingvaj koroj”. Pro tiu ĉi intervjuo mi trovis la tekston de la versaĵo kaj decidis korekti ĝin. Mi aldonas ambaŭ variantojn:

DIVERSLINGVAJ KOROJ

Rilatis li kun ironi’
Al ŝatokupo mia,
Kaj baptis Esperanton li
“Sensenca utopio”.

Al danco invitinte min,
Li flustris, koketante:
“Nu, diru ion ajn al mi
Almenaŭ Esperante”.

Mi sen traduko pri la am’
Konfesis kun la honto...
Sed li foriris por ĉiam’
Ne kompreninte vortojn.

Jes, al Pariz’ kaj Amsterdam’
Nin Esperant’ kondukas,
Sed diverslingvajn korojn jam
Ne helpos eĉ traduko.

Ĉeljabinsk, 1975

Rilatis li kun ironi’
Al mia vivpasio,
Kaj taksis Esperanton li
“Sensenca utopio”.

Al danco min invitis li
Kaj flustris, koketante:
“Nu, diru ion ajn al mi
Almenaŭ Esperante”.

Mi sen traduko pri la sent’
Konfesis jam ĉe sveno...
Sed li foriris post moment’
Sen zorgo pri kompreno.

Jes, al Pariz’ kaj Amsterdam’
Nin gvidas Esperanto,
Sed diverslingvajn korojn jam
Ne helpos ĉi peranto.

Moskvo, 2014

Kio koncernas la temojn kaj emociojn de miaj versaĵoj, mi apenaŭ povas klasifiki ilin. En juneco tio estis amsentoj, inkluzive amon al la patrotero kaj Esperanto, en pli aĝa periodo – “geografiaj” temoj, esprimantaj miajn impresojn pri la vizititaj lokoj. Ĝenerale mi havas tro malmulte da originalaj poemoj kaj kantotekstoj por serioze analizi ilin. La plej originalaj estas nur tri poemoj (inkluzive la cititan supre) pro “esperantecaj” metaforoj. La dua estas “La verda talismano” (1976), la tria – “Miksiĝas paroladoj viglaj” (1983). La lasta estas mallonga, do mi ankaŭ citu ĝin:

Miksiĝas paroladoj viglaj,
Ondiĝas homa maro muĝa...
Jen centre la okuloj nigraj
Kaj la ĉemizo hele ruĝa.
La kor’ jubilas malneŭtrala.
Pardonu min la rond’ amika –

En la kongres' universala
Min kaptis la objekt' unika.
Budapeŝto, 1983

Via kanto "Oriento" ofte sonas dum renkontiĝoj de uralaj esperantistoj, per la refreno "Orient' – fabela mia land'" ĝi fascine tuŝas la korojn kvazaŭ ĝi estus himno de uralanoj. Ĉu vi nostalgias pri Uralo? Ĉu vi vizitas ĝin? Ĉu vin daŭre interesas la vivo kaj agado de uralaj esperantistoj?

La tekston de la kanto "Oriento" mi verkis speciale por la konkurso "Liro-76" (la unua el "Liroj"), ĉar mi timis, ke tute ne estos konkursaĵoj. La ĵurio de la konkurso traktis ĝin kiel tro longan kaj komplikan por amasa percepto kaj plenumo. Mi ĝojas, ke la ĵurianoj eraris kaj la kanto iĝis kvazaŭ himno por la orientaj esperantistoj de nia lando. Do, mi havas pretekston por fieri lige kun tio.

Jes, mi nostalgias pri Uralo. Mi ĝenerale konkludas, ke estis mia eraro, kiam mi translokiĝis al Moskvo. Kiel esperantisto mi perdis min en Moskvo. Dum la tuta moskva periodo de mia vivo mi baraktis kontraŭ diversaj obstakloj, kiujn mi ne havis en Uralo. Tio forprenis la tutan mian forton. Estas bone, ke mi almenaŭ ne perdis la kapablon poezie tradukadi. Mi iam verkis ĉi-teman poemon, jen ĝi:

Saluton, mia patrotero!
Revenis mi el fora for'...
Karesas spiron freŝaero,
Refluas koren krea fort'.

Por kio mi dum duonvivo
Trampvagis ekster via sin',
Lasinte min al sorto-drivo?
Por kio mi disipis min?

Ĉi tie kantis mi dum juno
Kanzonojn, plenajn de fabel'...
Blindiĝis mi sen via suno,
Mutiĝis mi sen via bel'.

Ho, savu min de la doloro,
Instruu ree min pri rid'...
Saluton, lando de aŭroro!
Pardonu min pro la perfid'!
Miass, 1992

Jes, min tre interesas la vivo kaj agado de uralaj esperantistoj, kaj mi revas viziti iam unu el ties aranĝoj ("EsPrimo" k.a). Lige kun la okazonta komence de majo "EsPrimo-11" en Ĉeljabinsk mi deziras al ties partoprenontoj printempan humoron, interesan kaj kreivan aranĝon, sukcesojn en plua agado!

Via Ludmila Novikova

Ludmila, ankaŭ ni, konataj kaj nekonataj al vi uralaj esperantistoj, deziras al vi en via vivo bonfarton kaj multajn novajn originalajn verkojn kaj tradukojn. Ni dankas vin por la intervjuo kaj ĝojos revidi vin en Uralo!

Intervjuis Vladimir Opletajev (Surgut), marto 2015

MASI IĜIS 20-JARA

Ĉu vi estas rusia esperantisto kaj neniam aŭdis pri MASI? Tiukaze jen la skizaj informoj por vi.

Esperanta klubo "MASI" estis solene fondita la 24-an de februaro 1995 en MASI (Moskva ŝtata aŭtomobil-konstrua instituto, nun nomata Moskva ŝtata industria unuversitato – MGIU). La solenaĵon partoprenis dekoj da profesoroj kaj studentoj el kelkaj universitatoj, la rektoro de MASI, la verdan rubandon tondis György Nanovfszky – la tiama ambasadoro de Hungario en Rusio. Sub lia gvido la unuaj klubanoj recitis ĵuron pri fideleco al Esperanto. Tiutempe la instituto estis bazo por la agado de la Asocio subtena por AIS San Marino, la prezidanto de AIS Helmar Frank kelkajn jarojn estis profesoro de MASI-MGIU. En la instituto okazis AIS-sesioj, enkadre de kiuj la studentoj defendadis diplomajn laborojn en Esperanto. Dum 17 jaroj (1994-2011) Irina Gonĉarova etate instruis Esperanton por studentoj de diversaj fakultatoj kiel devigan studobjekton.

Esperanto-klubo MASI (en 2013 transformiĝinta al Moskva Esperanto-Asocio MASI) estas la plej granda (iujare – ĝis 80 membroj) kaj la plej stabile funkcianta loka E-kolektivo

en Rusio. MEA MASI estas sendependa E-organizaĵo, konstante akumulanta novajn gejunulojn kaj realiganta novajn projektojn konforme al sia Misio (vidu ĉe <http://ek-masi.weebly.com>). La plej gravaj:

– amasaj ĉiujaraj Esperantaj renkontiĝoj en diversaj rusiaj urboj "StRIGo" (1996-2006);

– lingvomergiĝaj E-renkontiĝoj "Apero" (2007-2015);

– rektmetoda E-kurso "Faru la Rondon!" (FaRo), ekde 2002 (en marto 2015 startis FaRo-45);

– SAT-Kongreso en MASI (2000), REU-Kongreso (1997), IJK-60 en Kovrov (2004), SES en Rusio (2014);

– kontribuaĵoj al la organizado kaj programoj de internaciaj eksterlandaj aranĝoj (IJK-61 en Zakopane, SES-1 en Slovakio, "Flugiloj de malfacila vento" en Pollando kaj Germanio ktp);

– muzika E-teatro (2008-2011), gastrolanta dum ASo, ISo, IJK, JES;

– Moskvaj Lingvaj Festivaloj (ekde 2005, en 2015 pasos la 10-a, vidu ĉe <http://www.lingvafestivalo.info/moskvo/>);

– kaj multo-multo alia.

Do, se vi estas rusia esperantisto, vi plej verŝajne aŭdis pri MASI, partoprenis iujn MASI-aranĝojn aŭ eĉ en MASI membris. Ajnokaze – dividu nian ĝojon: ni 20-jariĝis, kaj la pasinta februare APERo-9 neniel signis, ke ni intencas forpasi. Viajn gratulojn – tuj kaj tra la tuta nia jubilea jaro 2015 – ni akceptas ĉe la adreso <mirinda.strigo@gmail.com>. Nenion al vi rifuzu! Forme tio povos esti son- aŭ filmregistraĵo, aŭ simpla tajpita mesaĝo – eĉ proza! Ili ĉiuj estos atentitaj, publikigitaj, aŭditaj kaj montritaj en diversaj retresursoj de MEA MASI. Se vi aŭ via E-organizaĵo havas iun ideon pri kunagado, ni traktos ĝin kiel la plej valoran donacon! Se vi partoprenados niajn iniciatojn kaj aranĝojn, ni akceptos tion kiel la plej plezurigan ĝuon! Dankon, ke vi estas kun ni!

Mirina (Irina Gonĉarova), MASI-kunordiganto

APERo-9 FESTAS 20-JARIĜON DE MASI

APERo-9 – la tradicia sezonŝanĝa lingva mergiĝo de Moskva Esperanta Asocio MASI – jubile pasis la 20-an – 23-an de februaro 2015 en la apud-moskva ripozejo "Jerŝovo". La ĉi-jara APERo estis neordinara: la organiza kolektivo ekfestis sian 20-jariĝon.

Ni ne speciale zorgis pri pompa festeno dum APERo (kaj kie ajn). La principo de gastinvitoj estis tre simpla: kiu deziras partopreni la kutiman aranĝon, tiu partoprenu, kiu deziras gratuli, venu korpe aŭ mesaĝe kaj gratulu. Elkore dankas ni al Germain Pirlot el Oostende (Belgio), Nelly Darbois el Shamberio (Francio), Tereza el Val-de-Marne (Francio) kaj al la rusiaj samideanoj Raja Kudrjavceva (Jekaterinburg), Nikolao Gudskov (Moskvo), Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin). Iliaj mesaĝoj, fotoj kaj filmetoj konsistigis gravan parton de la jubileaj solenaĵoj. Gaste por unu tago venis kun siaj gratuloj konataj rusiaj aktivuloj Garik Kokolija, Mikaelo Ĉertilov, Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova.

Tamen la plej kara kaj grava por ni fakto estas la aktivega partopreno de la gejunuloj-novuloj – la tiamaj E-lernantoj. Ja tio esperigas pri daŭra vivo de MEA MASI! La distribuo de la partoprenintoj laŭ la lingva nivelo ĉi-jare estis ideala: 10 komencantoj, 9 progresantoj, 15 fluparplantoj. Du trionoj el la ĉeestintoj aĝis malpli ol 35 jarojn, la plej juna partopreninto – 17 jarojn, la plej aĝa – 64. 20 personoj el 34 partoprenis APERon la unuan fojon, por 8 gejunuloj ĝi estas la unua Esperanta aranĝo. Aldona ĝojo de la ĉi-jara renkontiĝo estis pli amasa veno de aliurbanoj (11 personoj el 9 urboj, inter kiuj 2 geeksterlandanoj – el Latvio kaj Italio).

Nun ni fanfaronu kaj fieru pri niaj unuafojaj "aperoj". Modele montris sin kiel organizanto kaj lingvoekposedanto nia financisto, registranto kaj ĉionpartoprenanto Karter (Aleksandr Basov) – nova trezoro de MEA MASI; la fluparolantaj "aperoj" Daŝa Zelenina (Ĉeljabinsk) kaj Tanjo Stepanova (Ĉeboksari) ĉiam senrifuze, volonte, plenrespondece, ĝuste kaj rapide plenumadis ajnajn taskojn; admirindis per senlaca partopreno en ĉio

kaj konstanta E-parolado kun ĉiuj Lanterna (Lubovj Ĉeremisina), Elmit (Aleksej Panov) kaj Teo (Vladimir Morgunov) – la tiamaj E-lernantoj de la E-kurso "FaRo-44", ŝokis per siaj lingvaj kapabloj la plej juna "apero" Kuzjma Smirnov (17-jara aŭtodidakto, kiu havis ŝancon E-paroli la unuan fojon en la vivo, babilis senĉese kaj prelegis pri la klingona lingvo); ĝuigis nin per sia kantado dueto de niaj novuloj Glorinda (Nina Zorĉenko) kaj Gastem (Ilja Muravjov). Kaj la ĉarma, tuj kaj senhezite ekamita saĝa-inteligenta-romantika belulino Luana – surpriza donaco el Italio, venigita de Tanjo el Ĉeboksari... La fundamenton de la aranĝo formis la tradiciaj balenoj: Miĉjo Povorin (Moskvo) kun siaj kvizoj, ludoj, konkursoj, koncerto, la senlace kantanta Sergeo Straŝnenko (Rigo), Klera (Julija Samsonova, MEA MASI) kaj Jona (Ilja Gimon, Moskvo) kun prelegoj, Iranta (Irina Gorodeckaja, Novoĉerkassk)... Kaj nokte mi ricevis apartan plezuron, ludante la "Homlupojn" kun Diador (Artur Grigorjev, MEA MASI), Aleksej Sinicin (Sankt-Peterburg) kaj Norden (Aleksandr Lebedev, MEA MASI)... Kiam mi rememoras la homan konsiston de tiu ĉi APERo, la animo kantas!

En tiu luksa kompanio la 22-an de februaro ni festenis ĉe la riĉa dolĉa tetablo tra la tuta nokto, kaj por la multnombraj gratultostoj estis eĉ diversaj alkoholaĵoj, malkutimaj por MASI-aranĝoj. Amikoj, ni aŭdis tiom da admiroj kaj dankoj – ĝis la konfesoj, ke kuniĝo kun MASI ŝanĝis homajn vivojn al plia feliĉo – ke eblas elspiri kontente: ni ekzistis ne vane, kaj – ni devas ekzisti plu!

Por la donaco MASI-anoj mendis de la partoprenontoj la prezentadon de ideoj por E-projektoj, kiujn ni povus realigi kune kun la aliurbanoj. Al tiu temo estis dediĉita granda atento – trejnadoj, prezentoj, pridiskutoj, konkreta planado. La aliaj programeroj estis kutimaj: lingvistikaj prelegoj, seriozaj diskutoj, konkurso de interpretistoj, peĉakuĉo, voĉlegado, poezikanta vespero, skeĉoj, kvizoj, tabloludoj, promenado al la nobela bieno, manlaboroj (perlumado, desegnado, kreado

de marionetoj, plektado de sonĝkaptiloj), komuna kantado, flugigo de lanternoj ktp. Sed plej gravas, ke ĉio pasis en hejmeca, vere familia etoso, kun ĉiamaj ŝercoj, ridoj kaj reciproka admirado de ĉies talentoj. Nur tiuj, kiuj havis similan sperton, povas vere trasenti tion, pri kio mi penas rakonti vorte... Simple: ni ĉiuj estis tre feliĉaj dum tiuj tri tagoj!

APERo-10 okazos en la samaj datoj en la sama loko. Venu!

Mirina (Irina Gonĉarova), kunordiganto de MEA MASI

P.S. Nur por la ĉeestintoj: la hisado de la flago! la Poezia Vespero! la orgio kun Uraganaj Porkoj! la voĉlegado de "Graf' Nulin"! la perlofloretoj de Mildina! la nova porkkanzono de Miĉjo! la lanterno sur elektrokablo! la "Neniam plu" de Bagi-Kuzjma! la granda bela besto kun iloj por inoj! la Labamba! … Kaj Garik donacis al MASI la dumvivan abonon de REGo!

***

Impresoj de la neorganizantoj pri APERo-9

APERo tre plaĉis al mi ĉar tio estis vera, plena, interesa, diversa kaj libera renkontiĝo. Mi vizitis alian APERon antaŭ du jaroj, kaj la nuna APERo plaĉis al mi pli. La plej grava afero estis la esperantistoj kun ideoj kaj projektoj. Tio inspiras agi, fari, ŝanĝi la vivon kaj la mondon. (***Alekseo Sinicin / Sankt-Peterburg***)

Ĉio pasis je unu spiro kaj kvazaŭ laŭ si mem – tio estas la supera pilotado de la organizantino! (***Larisa Ŝapoŝnikova / Arĥangeljsk***)

Mi daŭre kantas "Ĝojas ni, ke ja konstante Ni parolas Esperante... elegante..." kaj ridas sola kiam mi rememoras kelkajn amuzajn situaciojn. Jes, fakte mi estas tre feliĉa pro ĉi tiu sperto! Mi lernis multe kaj plu lernas repensante pri vi. (***Luana Leopizzi / Italio***)

La etoso en APERo estis kreita tre interesa, amika kaj plena de eventoj. Mi tre ŝatis partopreni en ĉiuj aferoj: ludi, legi kaj aŭskulti la versaĵojn, traduki, kanti kantojn, manlabori. Kaj mi povis malfermi ion novan en mi

mem (ekz. – deklamado de versaĵoj). Kvankam mi ne fluparolas, mi pliriĉigis mian vortoprovizon. Mi tre dankas al ĉiuj partoprenantoj de APERo kaj speciale dankas al Gastem, kiu invitis min al la lecionoj de Mirina! (***Lanterna / Lubovj Ĉeremisina / MEA MASI***)

Kiam mi trafis APERon, min surprizis tre amika etoso. Mi ŝatis, ke oni respektis novicojn, helpis ilin. Mia plej ŝatata programero estis la "Konkurso de tradukistoj". Tio estis tre, tre ridinda! Mi volas partopreni en APERo ankaŭ en la sekva jaro. (***Liza Dunajeva / Penza***)

APERo donis al mi eblecon paroli Esperante ne timante, ŝancon konatiĝi kun ĉarmaj homoj, kaj, sendube, lingvan praktikon. Mi esperas viziti ĝin ĉiujare. (***Ksenija Blinova / Penza***)

Kiam mi nur eksciis pri APERo, min tuj ekinteresis la ideo paroli nur Esperante dum kelkaj tagoj. Tio ĉi estis por mi la principa kaŭzo de la partoprenado – kun tiom strikta lingva disciplino, ĉu mi povos? Tamen, mi vere timis, mi eĉ pensis, ke ĉiuj estas se ne denaskuloj, do almenaŭ... esperantestroj, tiel diri. Sed ĉiuj miaj timoj estis forigitaj, ĉiuj bonkoris, afablis kaj min subtenis. La Poezia Horo estis tute ne tia, kian mi atendis, sed pli trankvila... pli poezia, pli romantika… La sekvan jaron mi estos jam pli sperta... Estos novaj novuloj, kiuj, kiel mi nun, bezonos subtenon, kaj mi certas, ke ni ĝin ja donos. Pro la trafa subteno, pro la povo senti sin libere en la vasta Esperantujo mi kore dankas ĉiujn kaj deziras, ke APERoj ĉiam daŭru! (***Kuĉjo / Kuzjma Smirnov / MEA MASI***)

Mi faris konkludon, ke por paroli pli bone, indas partopreni en pli da aranĝoj, havi pli da antaŭpreparo, paroli pli ofte publike, kaj ĉio estos bone! (***Gastem / Ilja Muravjov / MEA MASI***)

“KRISTALA REVO” DE NIA JUNECO...

Ĉi artikolo ne pretendas specialan originalecon: tial, ke vojaĝo al Brazilo estis unuafoja por mi, mi traveturis la plej popularajn lokojn, kaj apenaŭ mi rakontos ion novan kaj tre utilan en nia interreta jarcento. Tamen mi ŝatus prezenti iom da rememoroj dum ne ĉio “forvaporiĝis” el la kapo.

Mia emo viziti tiun ĉi enigman alihemisferan landon ekĝermis en malproksima jaro 1981, kiam en ĝia ĉefurbo Braziljo okazis la 66-a UK. Evidente, ankaŭ kelkaj miaj E-samlandanoj ekrevetis tiam veturi al Brazilo: ĝuste tiuepoke aperis la esperantigita de Semjon Vajnblat kanto “Amazonka”, kiun oni pasie kantas ĝis nun dum E-aranĝoj en Rusio: *“... Mi ankaŭ volas al Brazil’, al malproksima land’.”...*

Ideo veturi al Brazilo pli kaj pli “fermentis” dum la lastaj jaroj, kiam ni, rusianoj, ekhavis pli facilan eniron al multaj landoj. Kaj kelkaj nialandaj E-kuraĝuloj jam efektivigis ĉi-direktan vojaĝon. De komenco, rigardinte la mapon de Sud-Ameriko, mi ne kontraŭus viziti pornelonge ankaŭ iun najbaran landon (se mi planas flugi tiom malproksimen, kial ne?), sed pripensinte, mi preferis konatiĝi nur kun Brazilo, ol febre galopi tra ceteraj landoj. Pluse, Brazilo estas grandega lando kaj ekvidi multon mi apenaŭ sukcesus dum mia 20-taga januara feriado. Finrezulte, mi ekplanis vizitojn al la urboj São Paulo (San-Paŭlo), Santos kaj Rio de Janeiro (Rio-de-Ĵanejro), kiuj troviĝas relative proksime unu al alia. Do, mi ekmesaĝis al lokaj geesperantistoj. La respondoj venis senprokraste: afablaj brazilaj gesamideanoj pretis ne nur renkonti min en flughaveno kaj ĉe busstacidomoj, akompani tra urboj, sed ankaŭ gastigi min en siaj hejmoj, pro kio mi estis dankema. La lasta nuanco estis tre konvena pro la neatendita ekonomia krizo: aĉetinte flugbileton oktobre al la plej multekosta lando de Sud-Ameriko oni apenaŭ povis imagi situacion, kiun trafis nia lando decembre 2014...

San-Paŭlo. Matene post nokta senaventura 12-hora flugo el Eŭropo en la plej granda aerhaveno de Sud-Ameriko Guarulhos en San-Paŭlo min renkontas E-paro, la prezidanto de la ŝtata (administre

Brazilo dividiĝas je 26 ŝtatoj) E-asocio José Roberto Tenório da Silva kun la edzino, kaj ni veturas al la sidejo de la asocio. Unuetaĝa domo kun kelkaj ĉambroj (kunvenejoj, librovendejo, biblioteko, klasĉambro, kelkaj aliaj mastrumaj ejoj) teretaĝe, kaj kele – saloneto kun ĉ. 50 sidlokoj kaj tribuno, lasas ege pozitivan impreson pri serioza E-laboro, kiu estas farata ĉi tie. La domo, perfekte prizorgata unuavice de la prezidanto, fervora esperantisto bonnivele parolanta, eldonfasonisto laŭprofesie, estas proprietaĵo de la E-asocio. Vere, José Roberto bedaŭras, ke la kvanto de asociaj membroj falas, kaj konscias pri neceso pli intense agadi por altigi ĝin.

Por tagmanĝi ni iras triope al proksima restoracio simila al grandega mempriserva manĝejo. Tio, kion mi vidis tie, bezonas specialan priskribon. Neniam kaj nenie antaŭe mi spertis ion similan: oni vendas diversspecajn manĝaĵojn pokilograme! Ĉe enirejo oni ricevas malplenan fakturon. Apudas stoko de egalampleksaj teleroj, sufiĉe grandaj. Poste oni elektas manĝojn laŭguste kaj laŭplaĉe: salatojn, fiŝaĵojn, viandaĵojn, garnaĵojn, fruktojn, legomojn ktp. La unuan fojon oni ŝatus perokule gustumi ĉion: tiom abundas la elekto de parte nekonataj manĝoj, kaj ĉio estas apetitveka. Ne mankas la baza manĝo de brazilanoj, t.e. rizo kun ruĝaj (kutime) fazeoloj. Kun plenigita telero oni proksimiĝas al oficisto, kiu pesas la teleron kaj enskribas sumon en la fakturon. Se oni deziras ion trinki, necesas mendi aldone ĉe kelnero. Post la manĝo ĉe elirejo prezentu la fakturon kaj pagu. En preskaŭ ĉiuj ĉi-specaj restoracioj oni rajtas senpage trinki kafon el unufojaj plastaj glasetoj: Brazilo estas la unua kafproduktanto en la mondo! Similaj restoracioj estas tre popularaj en la lando kaj relative malmultekostaj, sed ili povas diferenci laŭ la pokilograma prezo, kiu premisas komfortecon de la restoracio, variecon kaj kvaliton de la manĝaĵoj.

Mi planis 6-tagan restadon en San-Paŭlo kaj tamen supozis, ke eble estas iom tro da tagoj por viziti la plej grandan brazilan urbon, kie apudas malnovaj malaltaj domoj kaj modernaj ĉielskrapuloj, surdeklivaj

malriĉaj kvartaloj kaj pompa urbocentro plenplena je oficejoj de diversaj entreprenoj, marĝenuloj kaj bonfartuloj, kaj kies loĝantaro superas 10 milionojn. Tial ankoraŭ aŭtune mi petis helpon ĉe José R. Tenório da Silva por okazigi viziton al lokaj fajrobrigadistoj. Evidentiĝis, ke tio estas ebla kaj eĉ interesa ankaŭ por la fajroestingistoj. Ĉi tie mi ne priksribu tion, kio rezultiĝis el mia ideo (supozeble, iuj el vi trovos ĝin iom stranga), ĉar pri nia vizito jam verkis artikolon la prezidanto de la E-asocio en <http://easp.org.br/portal/blogo/77-enlande/314-fajrobrigado> kaj resumis ĝin Fabricio Valle, la redaktoro de la revuo *Esperanto,* en ties ĉi-jara marta numero (paĝo 58).

Dum aliaj tagoj ne mankis vizitoj al urbaj vidindaĵoj akompane de alia loka E-aktivulino Aparacida de Souza Araújo, estraranino de la asocio. Aparte menciindas veturoj (senpagaj por pensiuloj, eĉ eksterlandaj: sufiĉas prezenti identigan dokumenton) per metroo kun vastegaj haloj kaj larĝaj vagonoj. Konstruita proksimume antaŭ 40 jaroj, ĝi konsiderinde malŝarĝis la urban trafikon. En certaj stacioj en centro de la urbo oni antaŭvidis platformojn ambaŭflanke de vagonoj: kiam alvenas metrotrajno, oni forlasas la vagonon tra la pordoj de unu flanko, kaj nur post tio estas malfermataj la pordoj de la alia flanko por enlasi novajn pasaĝerojn. Iun tagon ni atingas la ĉefan bazaron, en kiu estas vendataj fruktoj (multekostegaj en tiu ĉi tropika lando!): kelkaj el ili kreskas nur en Sud-Ameriko. Feliĉe, bonkoraj brazilaj vendistoj proponas senpage gustumi raraĵojn kaj ne insistas pri ilia aĉeto.

Santos. Januare posttagmeze pluvas en San-Paŭlo, kaj de tempo al tempo la akvo inundas kelkajn partojn de la urbo. Sed en la apuda Santos la ĉielo estas sennuba kaj brilegas hela sun'. Mi atingis tiun ĉi ĉeoceanan urbon per komforta buso. Iujn momentojn la buso apenaŭ moviĝis laŭ dukoridora ŝoseo pro kamionoj, kiuj veturigas diversajn kargojn al marhaveno de Santos. Dum 1,5-hora veturo mi ege frostiĝis. Tiomgrade mi ne frostas eĉ vintre en Rusio: klimatiziloj funkcias perfekte en Brazilo! Detalan artikolon pri "Klimatizado en brazilaj publikaj transportiloj" verkis aŭstra esperantisto Anton Oberndorfer, kiu samtempe kun mi vizitis Brazilon <http://esperantaretradio.blogspot.co.at/2015/02/klimatizado-en-brazilaj-publikaj.html>.

Krom promenoj tra la varmega urbo en kompanio de kelkaj geesperantistoj, komunaj vespermanĝoj, vizitoj al plaĝo, vidindaĵoj kaj al altaĵo, de kiu paraglisadumis lokaj aventuremuloj, ŝipekskurso laŭ Atlantiko prezentiĝis okazo veturi al bieno de la familio Mendes, ĉe kiu mi gastis. Kiu el ni ne memoras brazilajn filmoseriojn el la 90-aj jaroj? Ĝuste tiutempe rusianoj konatiĝis kun la vorto "fazenda". La veraj brazilaj "fazendoj" troviĝas sufiĉe for de urboj kaj ofte en kamparo aŭ tropika arbaro. Nuntempe iliaj posedantoj havas tie plenkomfortajn 1-2-etaĝajn domojn. Sur bienaj teritorioj troviĝas ĝardenoj, legomejoj kaj bestejoj. La vizitita bieno krome enhavis vastan terenon kun palmoj kaj aliaj tropikaj kreskaĵoj, du artefaritajn lagetojn kun bredataj karpoj, kiujn fiŝkaptis la mastro Jose kaj kiujn poste fritis la mastrino Zilda. Freŝiga akvo el fonto sur deklivo senĉese plenigadis naĝejon, en kiu ni naĝis savante nin de ŝvito sub la senkompata suno...

Pasaĝera fervojo mankas en Brazilo.Tial mi denove veturas perbuse. La vojaĝo inter Santos kaj Rio-de-Ĵanejro daŭras 8 horojn, sed la transfenestra pejzaĝo estas iom enua, ne tiel pitoreska, kiel mi ŝatus vidi dum taga veturo. Mezvoje la buso faras duonhoran halton. Preskaŭ ĉiuj pasaĝeroj de la buso iras al stacia restoracio por tagmanĝi. Ankaŭ mi sekvas ilin kaj denove konstatas pokilograman sistemon de priservado.

Rio-de-Ĵanejro. Kiu el ni ne memoras la grandartifikulon de ĉiuj tempoj kaj popoloj Ostap Bender kaj lian "kristalan" revon – per unu okulo ekvidi Rio-n kaj defili laŭ Copacabana [Kopakabana] en blanka pantalono kaj blanka ĉemizo…? Tial veninte al Rio mi rigardis ĝin per ambaŭ okuloj tra fenestro de la buso kaj sentis ondon de optimismo kaj de ĝojo, avara scivolemo penetradis min. Do, neniu en Rio surmetas blankan pantalonon, eĉ ne ĉiuj surmetas blankajn ĉemizojn! Dum konstanta varmo oni preferas ŝortojn kaj senmanikajn ĉemizojn de ajna koloro. Veninte 4 tagojn antaŭ la 50-a Brazila Kongreso de Esperanto mi ŝatis iom revizii kaj poluri mian prelegon. Por tio taŭgis la sidejo de la Kultura Kooperativo de Esperantistoj (prezidanto Givanildo Ramos Costa) en Rio, kien min akompanis Valeria Mattos, mia gastigantino. Fondita en 1951, post 5 jaroj ĝi aĉetis propran sidejon en urbocentro de Rio. Tie okazas lecionoj kaj



sambadromo en Rio

prelegoj, konversaciaj rondoj kaj kunsidoj, artaj prezentadoj kaj amikaj renkontiĝoj. Krome, en tiu sidejo funkcias libroservo kaj ekzistas riĉa biblioteko, kiun mi iom trarigardis: plejpartas libroj eldonitaj en Brazilo, ĉar dum pli ol 30 jaroj KKE estis unu el la plej elstaraj eldonejoj de libroj en kaj pri Esperanto. Nun, post kelkjara paŭzo, ĝi revenas al la E-merkato ne nur per libroj, sed ankaŭ per diskoj, revuoj kaj aliaj esperantaĵoj. KKE eldonas dumonatan esperantlingvan revuon "InKo", samformatan kiel REGo, kun koloraj paĝoj kaj koloraj fotoj. La estraranoj de KKE afable disponigis al mi la komputilon. Fininte la bezonatan pretigon, mi konversacias kun diversaj ĉeestantoj kaj poste adiaŭas ĝis renkonto dumkongrese.

Same, kiel en Santos, mia gastiganta familio loĝas ĉe la oceano, tial mi ne preterlasis eblecon sunbruniĝi kaj naĝi matene antaŭ promeni tra Rio vizitante kelkajn vidindaĵojn. La metroo ligas ankoraŭ ne ĉiujn partojn de Rio, tial oni devas veturi buse aŭ taksie. Same kiel en metroo, ankaŭ veturo en busoj (iuj kun klimatiziloj – brr!, aliaj – kun malfermitaj fenestroj) estas senpaga por pensiuloj.

futbala monumento apud Marakana

Vizitoj al certaj municipaj muzeoj kaj ekspozicioj estas tute senpagaj, tial mi profitis eblecon konatiĝi kun iliaj trezoraĵoj. En iu muzeo mi ekvidis hazarde teatrajn afiŝojn kaj prospektojn. Kaptis mian atenton la vortoj "A febre do samba", kiujn ne estis problemo tuj kompreni: sendube, mi ŝategus spekti sambajn dancojn tra riĉa historio de karnavaloj en Rio. Bonŝance, tiumomente mi estis kun loka esperantistino, kiu ankaŭ ne pretelasus ĉi teatraĵon, kaj ni ekrapidis al la teatro SESI. Post starado ĉe la teatra kasejo en vico de dezirantoj lastmomente aĉeti biletojn ni pasigas du horojn admirante surscene artistojn de tri civilizacioj – indiana, eŭropa kaj afrika, kiuj donacis al ni brazilajn ritmajn kantojn kaj virtuozajn dancojn, kiuj entuziasmigis ĉeestantan publikon danci fine de la prezentado. Alian tagon ni decidis supreniĝi al la montoj Urca [Urka] kaj Pão Açúcar (Sukera Pano). Tamen la deziro malaperis kiam mi rigardis de malsupro kiel balanciĝas kablotramo inter du montoj je ege granda alto: mi ne estas timulino, tamen ekstremaĵoj ne eniris miajn vojaĝplanojn. Ĉe la montoj – tropika arbara parko. Dum promenado sur ĝiaj vojetoj ni ekvidis malgrandajn sova-

ĝajn simiojn kun longaj maldikaj vostoj, kiuj laŭ la konduto similis nialandajn sciurojn.

Dum la vojaĝo preskaŭ ĉiam mi estis akompanata de lokaj geesperantistoj, tial mi ne sentis bezonon pri la portugala lingvo. Pluse, mi estis avertita anticipe de Emilio Cid, la ĉefdelegito de UEA, ke se mi troviĝos sola enurbe kaj nepros komunikiĝi kun lokanoj, mi parolu malrapide en Esperanto. Feliĉe tion mi jam spertis en 2006 dum la vojaĝo al Portugalio: certaj portugalaj vortoj similas laŭ formo, aliaj laŭ signifo al la Esperantaj: oriente, nordo, centro, turismo, fenomeno, instituto, numero, oceano, monumento, moda, problema, moderna, tomato ktp. Venante al Brazilo oni antaŭvidu, ke la loĝantoj scias neniun fremdan lingvon: eĉ la angla ĉi tie ne estas favorata. Tial oni lernu la portugalan aŭ kunprenu konversacilibron, alimaniere oni devos kompreniĝi pergeste...

La 50-a BKE. Kaj jen alvenis la tago, kiam komenciĝis la jubilea Brazila Kongreso de Esperantistoj kun la temo "Ĉu ni sukcesis?". Ĝi okazis de la 23-a ĝis la 27-a de januaro en konstruaĵo de UERJ – Universitato de la ŝtato Rio-de-Ĵanejro kun partopreno de ĉirkaŭ 250 personoj (http://esperanto.org.br/info/index.php/pages/kongresoj/okazintaj-bke/485-50bke2014), inkluzive malgrandan dekon da eksterlandanoj. En la sama marta numero de la revuo "Esperanto" sur la paĝo 64 oni povas legi artikolon de Fabiano Henrique pri la kongreso. Evidente, mi ne rajtas taksi rezultojn/sukcesojn de Brazila E-movado. Tial mi priskribu tion, kion mi vidis/spertis kaj kio restis marĝene, ekster la menciita artikolo. Unue, kio plaĉis: afableco de la kongresanoj, bona scipovo de Esperanto ĉe plejparto da ili kaj tute klara ilia prononcmaniero, riĉa elekto de E-literaturo kaj de diversaj esperantaĵoj prezentitaj de BEL, KKE kaj de la eldonejo Lorenz (prezidanto Robinson Mattos), sufiĉe amasa ĉeesto de kongresanoj en programeroj, riĉenhava prelego de la prezidinto de BEL Pedro Cavalheiro dum la malfermo, okazigo de diversaj kaj kelknivelaj E-kursoj, elokventa prelego de Anton Oberndorfer pri fondiĝo kaj funkcio de E-retradio, arta vespero kun bonkvalitaj prezentaĵoj. Mi havis okazon ĉeesti kunvenon de brazila E-junualaro, kiu okazigis sam-

Robinson Mattos

tempe sian 35-an Brazilan Esperantistan Junularan Kongreson. Sub gvido de la prezidanto de BEJO Fernando Jorge P.Maia oni priktraktis E-bonnivele problemojn de sia organizo kaj ĝiajn perspektivojn. Danke mi akceptis afablan helpon de la LKK-anoj (s-roj Fernando Pita, Marcio S. Nascimento, Allan Argolo) pri teknika organizo de mia progresiga kurso kaj mia prelego. Kaj jen alia flanko: de multaj brazilaj partoprenantoj mi aŭdis, ke ĉi kongreso estas malbone organizita kaj havas multajn mankojn. Pro ferioj en la universitato, en kiu okazis la kongreso, oni komencis riparon de certaj lernoĉambroj kaj aŭditorioj, tial oni konstante ŝanĝis lokon de tiu aŭ de alia programero, sed anonctabulo mankis. Same mankis iuj ajn indikoj pri okazata E-kongreso en la Universitato kaj en ĝia proksimeco. Dum la solena malfermo krom E-himno nenio solena okazis: ĝi estis fakte unuhora elpaŝo de preleganto – programero, al kies longdaŭro la publiko ne estis preta kaj iom enuiĝis. Kelkaj prelegoj okazis en la portugala lingvo, aliaj similis instruadon de E-gramatiko, kelkaj kongresanoj prezentadis siajn prelegojn legante surpaperajn tekstojn. Kaj sonis neniuj dankoj al partoprenintoj, kiuj pagis konsiderindan kongresan aliĝkotizon, al la prelegintoj kaj la gvidantoj de E-kursoj, neniuj "Tostoj kaj ŝaŭmvinoj al ĉiuj!" kiel estis skribite en la kongresa retejo kaj en la kongresa kajero. Ĉu kongresa merkatiko? Nu, fakte, tio ne tre gravas, ĉar drinki ĉe varmego +40 °C estas danĝere por ĉiuj!

la kongresaj organizantoj dum la malfermo

Meze de la kongresa programo, dimanĉe – ekskursa tago. Tiuj, kiuj deziris partopreni en unu el du ekskursoj (duon- kaj plentaga), devis pagi anticipe. Nur proksimume 30 kongresanoj veturis en ambaŭ busetoj, supozeble pro multkosteco de la ekskursoj. De unu flanko ekskurso estis tre interesa por mi, de alia – iom ĝena, ĉar la ĉiceronoj ne estis esperantistoj kaj inter kunveturintoj ne multis E-fluparolantoj. Tamen, la veturo tra Rio kaj al la fama statuo de Cristo Redentor (Kristo Redemptoro), simbolo de la urbo, estis tre allogaj. Ni ekvidis (vere, nur tra feraj kradoj) faman sambodromon por ensorbi laŭeble atmosferon de la plej granda karnavalo en la

mondo okazanta februare; originalan katolikan katedralon, konstruitan en la 70-aj jaroj de la pasinta jarcento, kiu laŭ sia formo pli similas piramidon de majaoj kaj kie en tiu mateno aŭdiĝis dimanĉa meso, kaj maldekstre de ĝi same neordinaran sonorilejon; "katedralon" de la dua religio en Brazilo, t.e. futbalo, – stadionon Maracanã [Marakana] kaj monumenton al brazila nacia teamo. La fina celo de nia ekskurso – la statuo sur la monto Corcovado [Korkovado]. La buseto malrapide suprenrulas laŭ serpentuma vojo. Post duonhoro – elbusiĝo, staro en kurta vico: ni ja estas grupvizitantoj. Apude videblas longa vicego de kompatindaj vizitontoj atendantaj dum kelkaj horoj sian eniron sub bruliga suno. Nia ĉiĉeronino aĉetas enirbiletojn. Ŝanĝo de buseto. Supreniĝo per lifto, poste per du eskalatoroj. Amasego da homoj, plejparte brazilanoj, tumultas ĉe la statuo. Ĉiuj fotas ĝin kaj sin sur ĝia fono, fotas pitoreskan panoramon de Rio kun ĝia neordinara pejzaĝo kaj laguno, neĝblankajn ĉielskrapulojn, brilantajn subsune, multkilometrajn plaĝojn kun ŝaŭma surfo, deklivojn kun verdaĵoj... Posttagmeze la ekskurso finiĝis, sed kelkaj el ni entreprenas memstaran busvojaĝon laŭ la plej longa (pli ol 13 km) kaj alta ponto ne nur en Brazilo, sed ankaŭ en Sud-Ameriko. Ĝi ligas la urbojn Niteroi kaj Rio-de-Ĵanejro. Niteroi estas konata pleje pro kelkaj konstruaĵoj de Oscar Niemeyer, unu el fondintoj de la moderna brazila arkitertura skolo. Ni vizitas la muzeon de moderna arto, kies ekspona-ĵojn ne ĉiam estas facile kompreni kaj inde apreci. Laŭ sugesto de Wandemberg R.Morais, prezidanto de LKK de la 87-a UK en Fortalezo 2002, ni revenas al Rio per ŝipeto.

Kio por mi estis/estas Brazilo? Krom abunda vegetaĵaro, suno kaj plaĝoj, mi ĝuis kontaktojn kun brazilanoj, simplaj kaj amikemaj, afablaj kaj bonkoraj homoj, ĉiam pretaj helpi. La Esperanto-fono de la vojaĝo estis plia pozitivaĵo por sopiri pri la pasigita tempo en la lando. Al Brazilo endas veturi. Do, la lastajn vortojn de la kanto: "... Ekvidos ĉu Brazilon mi dum mia vivo – ĉu?" mi povas feliĉe respondi: "Jes!"

Tatjana Loskutova (Ivanovo)

Eksciu, ke...

LA 28-a KONFERENCO DE REU

Estimataj samideanoj!

18-19.07.2015 enkadre de RET en Jadrin (Ĉuvaŝio) okazos vica Konferenco de REU. Informon pri ĝi Vi povas vidi ĉe <www.reu.ru>.

Ni invitas Vin partopreni en ĝi kaj fizike, kaj virtuale. Nun estas kolektataj proponoj, ideoj, projektoj por la Konferenco. Sendu Viajn ideojn al <konferenco@reu.ru>, ili aperos en la listo publikigita en la paĝo <https://docs.google.com/document/d/15wC1TE9_Om9Wbz6Jc20qb_ambU-86bOhRRc3xZXdp0Y/edit?usp=sharing>.

REU bezonas novajn fortojn por sia agado. Ni petas Vin persone partopreni en funkciado de la Landa Asocio. Proponu Vin por labori kiel estrarano de REU, aŭ kiel komisiito pri iu konkreta agaddirekto, pri kiu Vi opinias Vin sperta, aŭ utila por la asocio. Se Vi dume ne estas preta, aŭ estas preta, sed ĉi-jare ankoraŭ ne povas ekaktivi, do ni petas Vin sendi viajn rekomendojn pri aliaj esperantistoj taŭgaj por tiu laboro. Atentu, ke ne temas pri honoraj postenoj, sed pri utila por Esperanto-movado laboro enkadre de REU. Do bonvolu ne proponi simple estimindajn personojn, kiuj pro iamaj atingoj meritas gloron. REU bezonas realajn aktivulojn. Ne gravas, se Vi aŭ persono, rekomendita de Vi, momente ne estas membro de REU. Vi povas aliĝi iam ajn vizitinte <www.reu.ru>.

La kandidatoj estas listigataj ĝis 01.07.2015 ĉe <https://docs.google.com/document/d/1Z_xfrGHl8dzuQnCRHuSCZc2lYYudR3yOyD1N4P2l74c/edit?usp=sharing>.

Organizantoj de la Konferenco

SEULO GASTIGOS LA 102-an UK

La ĉefurbo de Korea Respubliko, Seulo, gastigos la 102-an Universalan Kongreson de Esperanto en la jaro 2017. La Estraro de UEA devis diskuti nekutime longe antaŭ ol fari la elekton inter Seulo kaj la kanada Montrealo, ĉar la invitoj de ambaŭ urboj estis zorge preparitaj kaj detale dokumentitaj. Ambaŭ lokoj prezentis tre bonajn kondiĉojn por sukcesa okazigo de la plej grava Esperanto-evento de la jaro. Pri tio raportis jam pli frue la Ĝenerala Sekretario Martin Schäffer kaj la Konstanta Kongresa Sekretario Clay Magalhães, kiuj pasintjare faris esplorvizitojn al ambaŭ lokoj.

La Universala Kongreso okazos en Seulo por la dua fojo. En 1994 ĝi gastigis la 79-an UK kun 1776 aliĝintoj. Korea Esperanto-Asocio estas unu el la plej viglaj landaj asocioj de UEA. Pri tio elstare atestas ankaŭ la fakto, ke la nombro de individuaj membroj en Korea Respubliko pli ol duobliĝis pasintjare: el 52 al 112.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

UEA SERĈAS NOVAN ĜENERALAN DIREKTORON

Pro baldaŭa emeritiĝo de la nuna ofichavanto, kandidatoj estas serĉataj por la posteno de ***Ĝenerala Direktoro de UEA*** kun enkonduka spertiĝperiodo ekde la 1-a de januaro 2016.

La Ĝenerala Direktoro (ĜD) estas la ĉefa oficisto de UEA, kiu laŭ la Statuto respondecas al la Estraro pri la detala mastrumado kaj kontrolado de la aferoj de la Asocio. La ĜD kunlaboras kun la Estraro kaj aliaj ofichavantoj por realigi la mision kaj vizion de UEA, responde al la aspiroj kaj bezonoj de ĝia membraro, en la kadro de la Strategia Laborplano. Interalie, la ĜD, kunlabore kun la Estraro, gvidas la movadan kaj ekstermovadan politikojn de UEA, zorgas pri la financa evoluigo de la Asocio kaj kreas sistemojn kaj etoson por efika kaj harmonia teama laboro en la Oficejo kaj la gvidorganoj.

Inter la nepraj kvalifikoj por tiu posteno estas: baza universitata diplomo; tre bona skriba kaj parola Esperanto (KER C1), kun iu grado de klereco pri la historio kaj kulturo de Esperanto kaj pri UEA; almenaŭ skriba rego de la angla; kaj laŭeble bona rego de aliaj lingvoj. Kandidatoj devus havi plurjaran sperton en respondeca posteno en regiona, nacinivela aŭ internacia asocio aŭ firmao, kaj almenaŭ bazajn konojn pri oficeja mastrumado, planado kaj komunikado. Tre dezirindaj estas pruvitaj konoj kaj kapabloj pri: membro- kaj donacvarbado; gvidado de volontuloj; kunlaboro kun volontulaj teamoj kaj estraroj; interkultura komunikado; kaj la gvidado de internaciaj neregistaraj organizaĵoj. Aktiva organiza sperto en la movado estas dezirinda.

Plena priskribo de la respondecoj, dezirindaj kvalitoj kaj bezonataj kvalifikoj ĉe la posteno estas trovebla en la retejo de UEA. Por kandidatiĝi sendu leteron kaj kompletan vivresumon retpoŝte al la Centra Oficejo de UEA <dungodir@co.uea.org> ĝis la 31-a de majo 2015. La plej kvalifikitaj kandidatoj estos invititaj al intervjuo kun estrara komisiono en Lillo, Francio, dum la du tagoj antaŭ la komenco de la 100-a Universala Kongreso. Se necesas pliaj klarigoj pri la posteno, bv. kontakti la Prezidanton de UEA, d-ron Mark Fettes <mtfettes@sfu.ca>.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

LA MALFERMO DE E-CENTRO EN ORIENTEŬROPA NACIA UNIVERSITATO

La 3-an de aprilo 2015, je la 15-a, en la ĉefa domo de Orienteŭropa nacia universitato nome de Lesja Ukrainka Ukrainia Esperanto-Asocio solene malfermis unikan E-centron. Ĝi funkcias ĉe la katedro pri romidaj lingvoj kaj interlingvistiko. La evento okazis enkadre de la festa semajno de Instituto pri eksterlanda filologio. En la instituto jam funkcias la germana, la franca, la kanada, la sveda kaj la araba centroj, kiuj okupiĝas pri iliaj lingvoj kaj kulturoj.

La solenaĵon en la granda aŭditorio komencis Nina Daniljuk, la estro de la katedro pri romanidaj lingvoj kaj interlingvistiko, profesoro, doktoro pri filologiaj sciencoj, estro de Instru-metodika komisiono de UkrEA, kiu konatigis la ĉeestantajn studentojn kaj profesorojn kun la gastoj, rakontis pri taskoj de la E-centro: prezento de speciala kurso por studentoj pri interlingvistiko, organizo de E-kursoj kun certiga atesto de la universitata nivelo laŭ eŭropa referencskalo, "rondaj diskuttabloj", sciencaj konferencoj, renkontiĝoj de esperantistoj, kunsidoj de la urba E-klubo "Arbara kanto" k.t.p.

La partoprenantojn gratulis la vicrektoroj de la universitato: la unua vicrektoro, prof. d-ro Anatolij Cjosj kaj la vicrektoro pri internaciaj rilatoj doc. Serhij Fedonjuk, kiuj parolis pri la perspektivoj de la E-centro. Ili substrekis, ke la E-centro devas kunigi multajn interesiĝantojn, daŭrigi la sciencajn esplorojn pri interagado de la etnaj kaj planitaj lingvoj en la kunteksto de la eŭropa integriĝo. Poste la gvidantino tralegis la gratulojn, kiuj venis okaze de la malfermo: de vicprezidanto de UEA, komisiito de ILEI pri la retkurso "Esperanto Etape" Stefan MacGill, prezidantino de ILEI Mireille Grosjean, sekretario kaj estrarano pri konferencoj de ILEI Radojica Petrović, kuratorino pri Eŭropaj Studoj, estro de la ukraina, la belorusa kaj la Esperanta kolektoj en Brita Biblioteko Olga Kerziouk, gvi-

danto de la Interlingvistikaj Studoj, gvidanto de la Finn-Ugra Katedro de Universitato Adam Mickiewicz prof. d-ro Ilona Koutny, prezidanto de la Esperanto-Societo de Ĉikago, d-ro lektoro de Jagelona Universitato en Krakovo kaj Universitato de Ĉikago Leszek Kordylewski, de Odesa Esperanto-klubo "Blanka Akacio", de Ukrainia Ligo de Esperantista Junularo (Andreo Jankovskij).

Venis por persone gratuli kaj partopreni la eventon la prezidanto de UkrEA kaj de bonfara fonduso nome de Vasilij Eroŝenko, akademiano de Internacia industria akademio Eŭheno Kovtonjuk, la popola aktorino de Ukrainio, prof. d-ro pri filozofio de Nacia Arta Akademio de Ukrainio nome de P.I.Ĉajkovskij, katedra estro pri enĉambra muziko de Nacia ŝtata filharmonio, vic-estro de la Societo de amikoj de Esperanto en UkrEA Eŭhenija Basalajeva.

Dum la elpaŝo UkrEA-prezidanto Eŭheno Kovtonjuk donacis al la E-centro dekon da libroj, inter kiuj estas la granda E-ukraina vortaro, la jubilea medalo de Vasilij Eroŝenko, kaj deziris strategian sukceson. Li ankaŭ invitis la ĉeestantojn partopreni E-renkontiĝon maje en Ĉernivci kaj jubilean 100-an Universalan kongreson de Esperanto en Francio.

Eŭhenija Basalajeva rakontis pri la koncerto, kiun ŝi iniciatis laŭ la verkoj de Vasilij Eroŝenko en Kijivo en la Domo de aktoro la 18-an de aprilo.

Prezidanto de Lucjka E-klubo "Arbara kanto", ĵurnalisto kaj pentristo Niko Voloŝin parolis pri la historio de E-klubo kaj ĝia prospero.

La studentinoj de Instituto pri eksterlanda filologio Tatjana Isnjuk kaj Marija Ŝved preparis interesan bildprezenton pri E-movado en la mondo kaj Ukrainio, pri IJK-2011 en Kijivo. Sonis originala E-muziko kaj E-kantoj. La studentino Katerina Vitoŝko kantis la bone konatan kanzonon de Taras Petrinenko "Ukrainio" en E-traduko, la studentino Tatjana Karpiv deklamis la E-tradukon de la fama poeziaĵo "Testamento" de la eminenta ukraina verkisto Taras Ŝevĉenko.

Poste la ĉeestantoj venis al ĉambro de la E-centro, kie ili daŭrigis la solenan malfermon. Dum la kunsido de E-klubo "Arbara

kanto” kun teo kaj dolĉaĵoj oni gratulis prezidanton Niko Voloŝin okaze de la 8-monatiĝo de liaj kaj de lia edzino Anja gefiloj-ĝemeloj, kiuj estas denaskaj esperantistoj. La kunsidon ĉeestis dekano de Instituto pri eksterlanda filologio doc. Oksana Rohaĉ.

La informacian subtenon de la evento efektivigis operatoro-produktisto de la televida kanalo “Rosa-TV” el Kijivo Roman Ĉihrinecj, ĵurnalistoj kaj fotokorespondentoj de la gazeto “Nia universitato”.

La adreso de la E-centro: *prospekt Voli 13, urbo Lucjk, Ukrainio 43026, Orienteŭropa nacia universitato nome de Lesja Ukrainka, katedro pri romidaj lingvoj kaj interlingvistiko*. La leterojn prefere sendi al prof. d-ro Nina Daniljuk per ordinara poŝto aŭ al la adreso <nina.danylyuk@gmail.com>.

(ukrainaj esperantistoj)

STATISTIKO 2014: DENOVE PLI OL 5000 INDIVIDUAJ MEMBROJ

En la aprila numero de la revuo “Esperanto” aperis la oficiala statistiko pri la membraro de UEA en 2014. Laŭ ĝi estis entute 5027 individuaj membroj, t.e. 124 pli multe ol en 2013. Plej multe da individuaj membroj liveris Germanio (462), Brazilo (454), Francio (429), Japanio (326), Usono (269) kaj Nederlando (206).

La plej granda kresko okazis en Brazilo (+77), evidente dank’ al la UK en la najbara Argentino, kie la kongresa efiko estis +27. El la modela varbado fare de la estraranoj Lee Jungkee kaj Martin Schäffer rezultis grava kresko en Korea Respubliko (+60) kaj Meksiko (+39). Same okazis ankaŭ en Ĉinio (+36), kie Trezoro Huang Yinbao ekfunkciis kiel nova energia kotizperanto. Menciindan falon, kvankam nur incidentan pro la fora UK, notis Francio (-40), Rusio (-24) kaj Pollando (-19).

La aligitaj membroj – t.e. tiuj membroj de la landaj asocioj, kiuj ne estis samtempe individuaj membroj de UEA – nombris 9789 (-230). Sekve la tuta membraro de UEA, kiu konsistas el la individuaj kaj aligitaj membroj kune, estis 14816 (-106).

449 individuaj membroj de UEA estis samtempe individuaj membroj de ĝia junulara sekcio TEJO. Tio estas 119 pli ol en 2014, tiel ke la kresko de la nombro de individuaj membroj de UEA okazis preskaŭ tute pro la plimultiĝo de junaj membroj. La nombro de junaj aligitaj membroj estis 1477 (-183). La tuta membraro de TEJO do iom ŝrumpis kaj estis 1926 (-64). La revuo *Esperanto* havis 2898 pagitajn abonojn (-70) kaj la junulara revuo *Kontakto* 690 (+89).

Gazetaraj Komunikoj de UEA

Mikaelo Bronŝtejn estas finverkanta romanon pri la vivo de esperantistoj en Rusio-Sovetio dum la epoko inter 1918 kaj 1938. La gvidantoj kaj aktivuloj de la tiama E-movado rolas tie kiel flankaj figuroj; la kvinopo de ĉefroluloj estas simplaj esperantistoj, kies sortoj interkirliĝas en la kaldrono de la nova bolŝevista ŝtato. Kelkaj ĉapitretoj el la romano estis publikigitaj pasintjare en "Beletra Almanako" № 20. REGo proponas al la legantoj unu el la partoj de tiu romano.

Mikaelo Bronŝtejn

Mi stelojn jungis al revado...

romano

Parto 4

Perlas per la belo stelo-stilo,
kun facilo ŝprucas Esperanto –
gaja til' de l' najtingalbabilo
dum trankvilo de l' printempa kanto.
Eŭgeno Miĥalski

Vasilj

1.

Pri la separatismo en SEU

... Sovetlandaj esperantistoj estas multnombraj kaj ilia multnombreco estas forto reala. Bedaŭrinde, la separatismaj tendencoj de apartaj grupoj kaŭzas malfortigon de tiu forto.

Kamaradoj el Ĥarkov, Kiev, Omsk k.a. lokoj forgesas la devizon iam faman en Esperantujo "La unueco donas fortecon".

CK proponas al ĉiuj provincaj kamaradoj insisti, ke ilia aliĝopago estu nepre direktata Moskvon.

CK memorigas al Ukraina Federacia Komitato, ke nur unuigite la sovetlandaj esperantistoj sukcesos en sia laboro.

Kaj ke plej grava malhelpilo por tiu sukcesa laboro estas ilia separatismo.

CK de SEU

"Soveta Esperantisto" № 6, 1925

– Bonŝance vi venis, samideano... tre bonŝance!.. Ŝajnas al mi, ke mi vidis vin en iu kunveno... Certe, jes! Mi rememoras – vi estas Koval...

– Vasilj. Vasilj Koval el Podolio[1].

– Jes, jes! Kaj mi estas Eŭgeno Miĥalski el Odeso. Ni ja konatiĝis antaŭ kelkaj jaroj... ĉi tie, en Kievo, dum esperantista kunveno... Nu, eble, vi ne scias... mi estas poeto... Volu nomi min Eŭgeno. Mi gvidos vin tuj en la publikan manĝejon, tute proksime ĝi situas... pli-malpli bonaj pladoj... nemultekostaj!.. Ankaŭ mi tagmanĝos – por kompanio! Sed poste – tuj en la klubon! Ĉio ekos tie precize je la tria! Jes, precize! Ĉar la jubileanto estas ege akurata persono!

La akompananto, poeto Miĥalski, estis stumblanta parole kaj paŝe, ĉar dum la rapidiro li foj-de-foje devis levi la kapon por rigardi la vizaĝon de la pli alta Vasilj. Post vica paŝstumblo, preskaŭ faliginta la poeton, Vasilj subtene prenis lian kubuton.

– Ne rapidu, amiko, – li iom detenis la apudpaŝanton kaj rigardis la horloĝon sur la stacidoma tureto. – Pli ol tri horojn ni havas. Sed kiu estas la jubileanto?

– Ho, vi konas lin! – Miĥalski denove levis la kapon. – Granda poeto! Kaj granda esperantisto! Devjatnin!

– Vasilij Nikolajeviĉ? – mire demandis Vasilj. – Kial mi ne konu lin? Ja mi rakontis tiam, en la kunveno... Li estas mia instruisto! – aldonis li kun certa fiero. – Sed kial jubileanto? Laŭ mia scio, li havis la jubileon antaŭ tri jaroj...

– Ho, la jubileo... ĝi estas speciala! – respondis Miĥalski. – Nia prezidanto Dmitrij Viktoroviĉ iniciatis ĝin. Tridek kvin jaroj... jam tridek kvin jaroj, imagu! Vasilij Nikolajeviĉ verkas en Esperanto dum tridek kvin jaroj!.. Jes, nun mi rememoras vian rakonton... pri lia instruado en iu germana prizono, en... ĉu en la dekkvara?

Neĝfloketoj, flugantaj nehaste kaj abunde, estis enorme grandaj, kvazaŭ iu ŝirus super Kievo lanugan kusenegon, kaj nun la lanugo descendanta dense plenigis la aeron, gluiĝante al paltoj kaj ĉapoj, degelante grandgute sur vizaĝoj kaj estigante sur la pavimo malagrablan kotan kaĉon.

---

[1] *Podolio (ukraine – Podilla) – en 1925-1932 gubernio de Ukraina SSR, poste disigita al Kamjanec-Podilska, Vinnica kaj Ĵitomira regionoj.*

– Ne, Eŭgeno, – diris Vasilj, per la voĉo same fiera. – En la deksesa jaro, en germana militkaptitejo.
– Ho jes, unika historio! – eksklamaciis la poeto. – Mi petas vin: prezentu ĝin pli detale dum la hodiaŭa festo! Sendube... sendube ĝi estos interesa por ĉiuj kaj... kaj ege agrabla por Vasilij Nikolajeviĉ! Kaj poste... hejme verku mallongan rakonton pri via esperantistiĝo! Mi zorgos, ke ĝi estu publikigita...
– Be! – Vasilj heziteme kapneis. – Mi ne estas verkisto. Eĉ leterojn al miaj amikoj mi skribas kun granda peno.
– Ne gravas, ne gravas! – kuraĝigis lin Eŭgeno. – Sendu al mi la tekston, mi poluros.
– Do bone,– konsentis Vasilj, kompateme spektante desupre, ke la degelintaj neĝeroj larme fluas laŭ la vangoj de la poeto. – Poluru. Mi ne dubas, ke vi poluros ĉion konvene.

Seka varmo de la manĝejo volvis ilin; ĝi estis agrabla kaj plezuriga. Plezuriga kaj bonodora estis ankaŭ la barĉo, prenita de ambaŭ, kvankam Vasilj enpense notis, ke io mankas al ĝi diference de tiu, kiun kutime kuiris Maria, instruita de lia panjo. Aĥ, Maria!..

– Ĉu vi havas Esperanto-grupon aŭ klubon? – demandis Eŭgeno.
– Mi loĝas en vilaĝo... – elparolis Vasilj. – Eble, io estas en la apuda urbo, mi ne havas tempon por viziti... sed mi korespondas kun multaj amikoj, ankaŭ kun eksterlando.
– Ĉu vi estas aliĝinta al SEU?
– Jes, mi aliĝis en la dudek tria.
– Do kien vi pagas vian membrokotizon?
– Al Moskvo.
– Tio ne decas, – konvinkite diris Miĥalski. – Ni parolu kun Dmitrij Viktoroviĉ. Se vi ne povas pagi al iu loka grupo, li akceptu vian kotizon.
– Mi ne komprenas, – Vasilj detenis plenan kuleron ĉebuŝe. – Ĉu estas diferenco? Ja ni estas unu organizaĵo...
– Simpla afero, – Eŭgeno parolis nun malrapide, kvazaŭ klarigante al nekomprenema infano. – Certa procento de la kotizoj laŭstatute devas resti en la kaso de ukrainiaj esperantistoj – por lokaj bezonoj. Sed se la kotizo trafas en Moskvon, ni ricevas nenion...
– Strange... – mediteme elparolis Vasilj. – Tamen ja poste... ekzemple, en la fino de ĉiu jaro oni povas rekalkuli ĉion kaj lasi en Kievo parton de la kolektita mono.

La poeto skrapis la nukon.

– Jes, verŝajne, ni lasas... Tiuj financaj kvereletoj... – balbutis li. – Mi ne

estas librotenisto, vidu...

– Mi komprenas, – diris Vasilj subtene. – Nu, se Dmitrij Viktoroviĉ konsentos... por mi ja egalas, kien mi pagu.

– Do bone! – la voĉo de Eŭgeno reakiris viglecon. – Iun demandon mi havis al vi... aĥ, jes! Oni petis, ke mi kaptu vin en la stacidomo – mi faris. Sed mi ne demandis vin, por kio vi venis... se pri la jubileo vi ne sciis... Ĉu vi havas iajn aferojn en Kievo?

– Jes, – respondis Vasilj. – Mia edzino estas tie ĉi... en hospitalo.

– Ho, amiko, mi kompatas! – la poeto metis sian kuleron, scivoleme rigardante al Vasilj. – Ĉu io grava? En kiu hospitalo? Ni havas kelkajn en Kievo...

Vasilj silentis, pensante pri respondo, kiu satigus la scivolemon de la kunparolanto. Sed nenion konvenan li sukcesis elpensi.

– Vidu... – li diris, kiam la silento iĝis liaopinie tro suspektinda. – Mi dume ne scias, kie ŝi estas. Morgaŭ matene mi devas informiĝi.

– Kie? – Eŭgeno gapis lin eĉ pli scivoleme. – Mi ne estas kievano, sed mi bone konas la urbon, amiko. Se mia helpo estos utila, ne hezitu! Mi estas libera morgaŭ...

– Ba... Ne zorgu. – Vasilj kapneis. – Ankaŭ mi konas la urbon ne malbone, kaj... kaj vi tutegale ne rajtas iri kun mi tien.

– Aha... – la poeto trovis mem taŭgan klarigon por si. – Virinaj problemoj.

– Je... jes, – respondis Vasilj. – Ĝuste... la virinaj...

2.

Mortigo de Petlura. Parizo (TASS) *Hodiaŭ la pasantan laŭstrate Petlura aliris iu ukraino kaj deklaris, ke li venĝas pro la murdoj de multaj rusoj kaj judoj en Ukrainio, kaj per revolvera pafo mortigis lin.*

"Leningradskaja pravda", la 26-an de majo, merkredo

La domo estis morne granda, grizŝtona, kun kradumitaj fenestroj de la unua kaj dua etaĝoj. Mankis ŝildoj, mankis afiŝoj, kutime donantaj almenaŭ ian informon pri certa domo, mankis fasada enirpordo – normala por la kvinetaĝa domo kvardek metrojn longa. Irante sub neĝofalo laŭlonge de la fasado, Vasilj ne trovis eĉ domnumeron, sed ĝi almenaŭ estis divenebla laŭ tiuj de la najbaraj domoj ambaŭflanke. Li ĉirkaŭiris la domon; jes, ĝia dorsa flanko havis tri pordojn, – ĉiuj estis ŝlositaj kaj havis neniajn ajn ŝildojn, – sed unu el la flankaj havis sonorilbutonon. Vasilj premis ĝin.

Post kelktempa atendo la pordon malfermis virino en blanka kitelo. Ŝia vizaĝo prezentis nenioman afablon aŭ scivolemon.

– Dokumenton! – kurte raŭketis la virino.

Vasilj tiris el la interna poŝo paperon, ricevitan hieraŭ en certa oficejo, kies nomon oni petis forgesi. Preninte la paperon, la virino atente rigardis lin kaj demandis:

– Ĉu la edzo?

– La edzo, jes, – konfirmis Vasilj.

– Bone, – elparolis la virino. – Sekvu min.

Iom mildiĝis ŝia vizaĝo, kaj dum ilia kuna iro laŭ la koridoroj de tiu sekreta hospitalo ŝi bonvolis eligi kelkajn informajn frazojn.

– Via edzino estas jam transportebla, – diris ŝi, – eĉ kapablas nelonge promeni. Vi devas subskribi kelkajn paperojn. Poste oni veturigos vin al la stacidomo per aŭtomobilo. Ne komisiu al ŝi pezan laboron hejme. Almenaŭ dum tri monatoj. Krom tio, vi devas scii, ke ŝi ne plu povas naski. Kaj laste: demandu ŝin pri nenio. Ŝi donis subskribon pri sekreteco de la aferoj.

– Jes, – diris Vasilj. – Pri tio oni jam avertis min.

... Ĉio pasis glate kaj bonorde dum ilia dusemajna restado en Germanio. La bienon Brambach ne multe tuŝis la milito, nek la postaj ribeleventoj; relativa stabileco ŝvebis tie, kvazaŭ la tempo estus kuranta ie flanke, ekster la limoj de la bieno. Maria loĝis tie ripoze, preskaŭ senzorge. Ĉiuj parencoj ne trude, sed konstante dorlotis ŝin, atentis ŝiajn kapricetojn, kvazaŭ petante indulgon de la multsuferinta knabino pro sia pli sata kaj pli komforta vivo.

Grigorij estis prezentita de ŝi kiel fora parenco de la familio, prapranepo de iu Ludwig Brambach, elmigrinta en Rusion antaŭ pli ol jarcento kaj instaliĝinta ĉe Volgo. Antikve aspektanta dokumento konfirmis tion, do Grigorij estis akceptita en la bieno kun degna afablo. Des pli, ĉar liaj komunikiĝemo, konstanta bonhumoro kaj specifa mola elparolo de la germanaj vortoj tuj amikigis lin eĉ kun la plej aĝaj bienanoj. Cetere, nur unu plenan tagon li restadis en la bieno. Poste oni ne ofte vidis lin; ien forirante por dutri tagoj, li reaperadis foje malfruvespere, foje frumatene por denove malaperi post kelkaj horoj. Aferoj kaj aferoj, grava komisio pri grandindustria negoco – klarigis li siajn forirojn. Helpo, asisto pere de la familiaj konatoj? – Jes, dankon, eble iom poste, se aperos bezono… Kun Maria – se li volis resti nekomprenita de la apuduloj – li parolis en Esperanto aŭ en la rusa.

La lastan tagon antaŭ la forvojaĝo hejmen ili duope venis al Lepsiko. Lasinte siajn valizojn en la stacidoma deponejo, la paro nehaste, promene iris por tagmanĝo al restoracio, rekomendita de Maria kiel bonkvalita kaj ne tro altpreza. Senvarma, sed gaja decembra suno malavare lumigis la straton kun ĉarmaj dometoj, junaj tilioj kaj rebrilanta senneĝa pavimo. Turdoj gaje fosis falintan foliaron apud la arbetoj, Grigorij gaje babilis pri iaj baga-

teloj... entute ilia lasta tago en Germanio estis gaja kaj senzorga ĝis subita apero de tiuj kvar buboj.

Maria sentis, ke Grigorij iel streĉiĝis, rimarkinte ilin de distanco, verŝajne, centmetra. Jes, ŝi nur sentis, ĉar li neniel elmontris sian streĉiĝon, nur eble por momentero stumblis ĉe rakontado de vica ŝerco.

La buboj estis laŭaspekte samaĝaj kiel Grigorij, vestitaj konvene, eĉ plimalpli ŝike por la nuna ne tro prospera tempo en Germanio. Du el la kvaropo fumis luksajn cigaredojn, unu el la fumantoj dum la iro atente kaj eĉ kun ia embaraso rigardis al Grigorij.

– Ha, mi ne eraras! – li elparolis, alirinte. – Sinjoroj, mi prezentu al vi mian iaman konaton kaj samklasanon gimnazian. Estas mem Rapoport, unu el la plej altpoentaj diplomitoj! Ĉiam lia prudento kaŭzis mian estimon kaj envion! Sed nun... nun mi ne scias... li ja devas nun esti ie tie – en Petrogrado, aŭ en Moskvo. Tamen jen li, sendube li! – staras antaŭ mi en Lepsiko kaj eĉ kun ĉarma sinjorino! Bonan tagon, Rapoport!

– Bonan tagon, Savickij! – respondis Grigorij. – Neatendita renkonto, ĉu ne?

– Mia respondo estu "jes", – diris Savickij, elbuŝiginte fumringon. – Ĉu vi bonvolos prezenti al ni vian edzinon?

Nur du aŭ tri pasantoj estis krom ili nun en la tuta strato; kelkdek metrojn antaŭe Maria rekonis altan blankan preĝejon kun kruco. Grigorij prenis ŝian kubuton.

– Mi ne vidas bezonon prezenti al vi la sinjorinon, – diris li kun afablega rideto, adresita al la kvaropo, – ĉar ŝi ne estas mia edzino.

– Aj, bravulo! – komentis Savickij ĉe elokventa ekrido de la kompanoj. – Do, mi ne insistas, sed...

– Sed mi serĉis vin, – rapide intervenis Grigorij. – Mi supozas, ke vi ne rifuzos interŝanĝi kun mi kelkajn frazojn vid-al-vide.

– Kial ne? Volonte. Eĉ kun plezuro! – tute gaje replikis Savickij. – Sinjoroj, sekvu nian vojon, ne rapidante, kaj atendu min tie, ĉe la stratkruciĝo. Mi kuratingos vin post du minutoj.

Grigorij, tenante la kubuton de Maria, faris kune kun ŝi paŝon en direkto, irita antaŭe.

– Iru, Maria... – diris li mallaŭte, – iru kaj ne montru, ke vi rapidas. Ankaŭ ne retrorigardu, mi petas. Sed se okazos io neatendata, tuj kuru tien – en la preĝejon.

Maria ĵetis al li maltrankvilan rigardon, sed li ridetis trankvilige, kaj ŝi ekiris. La kompanoj de Savickij jam estis kelkajn paŝojn for. Grigorij turnis sin al Savickij, tenante ambaŭ manojn en poŝoj de la palto. Savickij en la

maldekstra mano tenis finbrulantan cigaredstumpon, sed en la dekstra nun aperis eta pistolo.

– Do, Rapoport, amiĉjo, – rikanis Savickij, – mi rajtas supozi, ke vi akiris ruĝan kalsonon.[1] Kaj ĝuste pro tio vi serĉis min, ĉu ne?

– Dependas, – diris Grigorij. Li silentiĝis por momento, lasante iun hazardulon preteriri, kaj daŭrigis, – dependas de via nuna okupo, Savickij.

– Mi ne ŝanĝis mian okupon kaj mian kredon, diference de vi, kanajlo, – kun sama rikano respondis Savickij. – Se tiu ulino ne estas via edzino, ŝi iru plu. Sed vi devas iri kun mi.

– Ĉu mi rajtas ricevi respondon pri kialo? – Grigorij rigardis rekte en liajn okulojn.

– Por respondi al... vi scias al kiu, pri kaŭzo de via apero ĉi tie.

– Sed se mi rifuzu?

– Ne eblas, – ridetis Savickij. – Mi estas rajtigita mortpafi vin tuj, sen justa juĝo, se vi rifuzos...

– La saman rajton mi havas pri vi, – diris Grigorij.

Maria ne aŭdis tiun ĉi interparolon; ŝi jam preskaŭ aliris malaltan baraĵon de la preĝeja korto. Tiam ŝi aŭdis la unuan pafon, kriojn "Ho-ho! Kaptu lin! Kaptu!", frapadon de botoj surpavime kaj kelkajn pliajn pafojn. Io mordis ŝian dorson ĉelumbe. Ŝi kurbiĝis, turnis la kapon reen kun miro, sed la alkurinta Grigorij levis ŝin kaj ĵetis trans la baraĵon, mem saltinte post ŝi.

Ŝi ĝemis. Ŝi aŭdis fajfadon de kurantaj policistoj kaj forkuran trotadon de kelkaj piedparoj. Ŝi sentis, ke Grigorij levas ŝin kaj portas al la preĝejo. Ŝi vidis, ke iu en nigra pastra vesto malfermas la pordon, kaj ŝi ĝemflustris: "Doloras min... tre doloras..." "Dio sankta! – aŭdis ŝi la flustrokrion de la pastro. – Ŝi parolas en Esperanto! Eniru rapide, eniru!" "Ĉu vi havas telefonon?" – aŭdiĝis la responda flustro de Grigorij. Poste la konscio flugis for de ŝi.

Du policistoj alkuris la kuŝantan Savickij, aliaj du daŭrigis persekutadon de la fuĝantoj. La policisto, tuŝinta la kolon de Savickij, elparolis:

– Kadavro.

Li ŝovis la manon en internan poŝon de ties palto, eligis la paperojn, dum momento rigardis, poste diris al la kompano:

– Denove ruso. Denove, Günter, ili solvas siajn politikajn problemojn ĉe ni, en Germanio. Sed por ni sufiĉas la niaj, ĉu ne?

Esperantaj poŝtmarkoj

Okaze de la 30-jara jubileo de la invento de la sendrata telegrafio far la rusa sciencisto A.S.Popov, la Popolkomisarejo de poŝtoj kaj telegrafoj el-

---

[1] *Aludo pri kunlaboro kun bolŝevistoj*

donis omaĝe al la inventinto la poŝtmarkojn kun prezo 7 kaj 14 kop. en kvanto 6 000 000 ekz., kun portreto de la inventinto kaj surskribo en Esperanto: "Inventisto de radio Popov".

"Meĵdunarodnij jazik" № 1, 1925

3.

Pro la intenca kripligo kaj falsigo de ĉiuj informoj pri vivo en Sovetio per la nacilingvaj gazetoj, eksterlanda leganto ofte havas tute malĝustan opinion pri nia lando.

Ni uzu la okazon senpere, sen perado de la naciaj gazetfalsigistoj, diskonigi la veron pri Sovetio. En koncizaj, ne tro longaj artikoloj, raportu pri la politika, socia, arta, scienca kaj teknika vivo en nia lando. Traduku artikolojn el niaj gazetoj kaj ĵurnaloj kaj verku mem artikoletojn pri temoj, en kiuj vi estas kompetentaj laŭ via profesio.

Per tio vi helpos disŝiri la reton de mensogoj, kiu nin ĉirkaŭas, kaj profitos mem, perfektiĝante en la lingvo.

H.Frank, Leningrad, "Soveta Esperantisto" № 3, 1925

La dudekokan jaron vivis Vasilj sur la tero, sed la unuan fojon li trafis tian vagonon. Afabla ŝoforo, liadire iama vilaĝano, venigis ilin al la stacidomo, preter la atendeja bruego, preter la sieĝataj biletkasoj gvidis al la kajo kaj, prezentinte iun paperon al la vagonestro, sidigis en tiun dupersonan, burĝe luksan kupeon. Du molaj litbretoj, unu super la alia, tableto kun lampo, broditaj kurtenoj surfenestre kaj, ĉefe, la vagonestro afablega, servopreta, eĉ demonstre servila. Restis duonhoro ĝis la starto de la vagonaro, sed li tuj proponis plian kusenon por Maria... tuj alportis teon en belaj glasoj... Ŝerce Vasilj diris al Maria, ke li eĉ bedaŭras, ĉar ĉi luksaĵoj restos en ilia dispono nur por la okhora vojaĝo. Cetere, nur du kupeoj, krom la ilia, estis okupitaj en la vagono.

Maria... ho jes, ŝi ridetis, sed, trinkinte iom da teo, ŝi petis, ke Vasilj helpu ŝin enlitiĝi. Ŝi estis ankoraŭ tre malforta, lia Maria. Levinte la kapon de sur la kuseno, ŝi flustris al Vasilj:

– Kara, ĉu vi scias... ili laŭdis min... ili premiis min... tie en la vojsako estas la mono! Novaj rubloj... ion bonan ni aĉetos por la infanoj...

– Dormu-dormu, mia bona. Ripozu. Mi fumetos ekstere, dum la trajno restas ĉe la kajo, – reflustris Vasilj.

Li ordigis la litkovrilon sur ŝia lito, kisis ŝin, surmetis la ĉapon kaj eliris. La stacidoma horloĝo montris, ke dek du minutoj restis ĝis la ekveturo.

– Hej, vidu, jen li estas! Vasilj! Vasilj! – aŭdis li, elirinte el la vagono kaj apenaŭ ekfuminte. – Vasilj!

Li turnis la kapon direkte al la krioj kaj ekvidis du virojn, kurantajn al la vagono laŭ la kajo. Tuj rekoneblaj estis la viroj: la alta, magra Viktorov-Ĉeĥoviĉ en trivita ŝafofela ĉapo kaj la poeto Eŭgeno, kies kvadratita koltuko duone malvolviĝis kaj flagris malantaŭ lia dorso.

– Uf-f... – elspiris Dmitrij Viktoroviĉ, la unua alkurinto. – Ni, stultuloj, serĉas vin en ordinara vagono, sed vi – jen kie vi instaliĝis! Kun "NEP-uloj"!

– Certe, jes! – donante ŝercan gravecon al sia voĉo, respondis Vasilj, premante lian manon, poste tiun de la alkurinta Eŭgeno. – Mi ne rajtas ŝpari monon, se la edzino bezonas komfortan veturadon. Do estu mi "NEP-ulo" – almenaŭ por ununura vojaĝo.

– Ĉu vi konatigos nin kun via edzineto? – demandis Eŭgeno.

– Indulgu, amikoj, ŝi dormas jam, – respondis Vasilj.

– Do ne gravas! – eksklamaciis Dmitrij Viktoroviĉ. – Alifoje... Restis nemulte da tempo, ja ni venis, sciante, ke nur tiu ĉi trajno iras al via urbo...

– Kaj ne nur por premi vian manon, kvankam ankaŭ tio estas agrabla, – daŭrigis Eŭgeno.

– Do rakontu, – diris Vasilj. – Vere, nur dek minutojn ni havas por babili.

– Du aferoj, – respondis Dmitrij Viktoroviĉ – Du aferoj, sed ambaŭ gravaj. Hieraŭ dum la jubileo de Devjatnin ni ne diris al vi – la informoj venis nur hodiaŭ. La unua gravaĵo estas ankoraŭ ne plencerta, sed probabla naŭdekprocente. Somere, verŝajne, en julio okazos vica kongreso de SEU, tio kompreneblas per si mem. Sed ankaŭ la aspirata SAT-kongreso en Leningrado povas okazi. Vi komprenas, ne multajn kamparanojn ni, esperantistoj, havas en niaj vicoj... kaj vi kiel konscia kaj bonega esperantisto estas la plej taŭga kandidato por reprezenti la ukrainajn kamparanojn en ambaŭ kongresoj. Kion vi opinias pri tio?

– Nu... – diris Vasilj. – Foje mi jam estis en SEU-kongreso, ne estas io nova por mi...

– Ho, tiu aranĝo estos tute alispeca, Vasilj! – arde diris Eŭgeno. – Venos eksterlandaj laboristoj, eble ankaŭ kamparanoj, do vi povos kontakti! Eble, eĉ iu el viaj korespondamikoj venos!

– Sed... – Vasilj mediteme rigardis ilin. – Sed eble vi trotaksas min. Certe, estas pli dignaj kandidatoj...

– Ne, ne! – entuziasme kaj plenkonvinke oponis Dmitrij Viktoroviĉ. – Ni konas vin dum kelkaj jaroj, vi bonege regas la lingvon, vi multe korespondas...

– Ĉiuj samideanoj fidas al vi, Vasilj, ne dubu pri tio! – aliĝis Eŭgeno.

– La dua afero, kara amiko, estas ligita kun la unua, – daŭrigis Dmitrij Viktoroviĉ. – Ni supozas, ke la rilatoj inter SAT kaj SEU evoluas ne tiel glate, kiel dezirindus. Kaj tio, verŝajne, kaŭzos kelkajn vortbataletojn dum la someraj kongresoj. Mi ne volas trudi mian opinion, ja estos pli bone, se vi memstare formulos vian opinion pri la eventoj. Por tio mi alportis kelkajn lastatempajn dokumentojn de SAT... la revuon el Moskvo vi ricevas kiel SEU-ano, ĉu ne? Do volu legi, kompari kaj resumi en la kapo. Eventuale, ĉio ĉi estos interesa ankaŭ por via edzino, vidu, la virinoj foje scipovas bone konsili...

– Jes... certe, ŝi kapablas, – diris Vasilj.

La vagonestro signis averte, ke la trajno estas baldaŭ startonta, kaj Vasilj leviĝis sur la ŝtupon de la vagono.

– Pliaj aferetoj, Vasilj, – diris Eŭgeno, proksimiĝinte. – Se vi ricevos interesajn leterojn pri la vivo de alilandaj proletoj, kopiu ilin por mi, mi petas. Mi faros revuon por la ukraina gazetaro. Kaj ja ankaŭ vi skribas al viaj korespondamikoj – eble mi povas ion konsili pri la enhavo de viaj leteroj. Certe vi legis, ke ni devas komuniki veron pri la eventoj en Sovetio al niaj alilandaj samideanoj...

Aŭdigis ekmuĝo de la lokomotivo, kaj la radoj de la vagonaro komencis malrapidan rotacion. Dmitrij Viktoroviĉ svingis la manon adiaŭe.

– ... kaj ne forgesu! – kriis la poeto. – Ne forgesu, ke vi devas sendi al mi vian historion!

– Mi sendos! – kriis Vasilj, mansvingante.

Tio, kion vi bezonas akiri.

N.Nekrasov. Tra USSR per Esperanto. Konsultlibro kaj praktika Esperanto-rusa frazaro. Prezo 20 kop.

"Meĵdunarodnij jazik" №№ 20-22, 1926

(daŭrigota)

Ukrainia Esperanto-Asocio kunlabore kun Societo por subteno kaj defendo de la ukraina kulturo "Espero", bonfara fonduso nome de Vasilij Eroŝenko "ESPERO", societo "Eko-kulturo" elkore invitas ĉiujn esperantistojn al la Unua okcidentukrainia renkontiĝo "Bukovina printempo", kiu okazos la 01-an – 11-an de majo 2015 en Ĉernivco – la ĉefurbo de Bukovino! En la programo: Esperanto por ekstera publiko, 125-jariĝo ekde la naskiĝo de Vasilij Eroŝenko, Literatura Foiro, Lingva Festivalo, Junulara Ĉielarko, Pitoreska Bukovino. Ĉiujn bezonatajn informojn kaj kontaktojn eblas trovi ĉe <http://ukrea.retejo.net/bukovina-printempo/>.

LIBROSERVO DE UEA EN 2014: "POŜAMIKO" VENKIS, VENDOJ MALKRESKIS

La lingvoekzercilo *Poŝamiko* de B.Allée kaj K.Kováts estis pasintjare la plej furora titolo de la Libroservo de UEA. Tiel estis ĉiam ekde 2011, sed la surprizo de 2014 estis la ĉiamverda klasikaĵo *Fundamenta krestomatio de la lingvo Esperanto*, kiu konkeris la duan lokon pro grandaj mendoj el Koreio. La plej dezirata novaĵo estis *Homoj de Putin* de Kalle Kniivilä, premiita kiel la plej bona nefikcia verko en Finnlando.

Komerce la jaro ne estis bona, ĉar la Libroservo vendis sume por € 70 941, t.e. 8,6% malpli ol en 2013. Du kaŭzoj elstaras. Unue, por la tria sinsekva jaro UK estis malgranda. En la lastaj du grandaj UK-oj, Roterdamo (2008) kaj Bjalistoko (2009), la vendoj sumiĝis resp. je € 40 500 kaj € 29 500. En Bonaero temis pri € 15 453, kio tamen estis bona rezulto por UK kun 706 aliĝintoj. En 2013 en Rejkaviko (1034 aliĝintoj) la sumo estis € 14 755; ankaŭ malpli ol la sumo de € 15 154 en 2012 en Hanojo (866 aliĝintoj).

Kvankam komerce tri malgrandaj UK-oj sinsekve estis peza bato, multaj esperantistoj, al kiuj tio normale ne eblas, povis en Hanojo kaj Bonaero profiti de unika ŝanco aĉeti Esperanto-librojn. La ĉi-jara UK en Lillo, eble eĉ kvarobla ol pasintjare, espereble spronos la vendojn tiom, ke la limo de € 100 000 estos reatingita – unuafoje post 2011, kiam la jara vendado sumiĝis je € 101 632.

Alia grava kialo estas la plua malkresko de la nombro de novaj libroj, aparte drasta pasintjare. Laŭ la statistiko de A.Korĵenkov en *La Ondo de Esperanto* (2015:2), la rubriko *Laste aperis* de la revuo *Esperanto* registris pasintjare 107 novajn librotitolojn (178 en 2013, 153 en 2012, 172 en 2011, 204 en 2010).

La unua el la ĉi-subaj statistikoj montras la tutan vendonombron de la koncernaj titoloj. Ĝin ĉefe influas aliaj libroservoj, kiuj mendas samtempe pli ol unu ekzempleron de sama titolo por poste pluvendi al siaj klientoj, ofte en daŭro de pluraj jaroj. La listo de unuopaj vendoj konsideras nur la vendojn al klientoj, kiuj rekte mendis aŭ aĉetis surloke ĉe UEA. Neniu disko sufiĉe vendiĝis por eniri iun el la listoj.

Vendoj entute (ekz.):

188 Poŝamiko (B.Allée & K.Kováts)
110 Fundamenta krestomatio de la lingvo Esperanto (L.L.Zamenhof)
83 Vojaĝo en Esperanto-lando (B.Kolker)*
68 Homoj de Putin (K.Kniivilä)

65 Asteriks kaj Kleopatra (Goscinny & Uderzo)
61 Saluton! (A.Childs-Mee)*
58 Mil unuaj vortoj en Esperanto (H.Amery & S.Cartwright)
50 Beletra Almanako 19
49 Gerda malaperis! (C.Piron)
49 Baza Esperanta radikaro (W.F.Pilger)*
47 Beletra Almanako 20
43 Beletra Almanako 21
40 Pocket Esperanto Dictionary (A.McLinen)*
35 Internacia Kongresa Universitato 2014 (Red. J.A.Vergara)*
34 Esperanto Mini-Grammar
34 Dictionnaire de poche / Poŝvortaro (Red. A.Andrieu)
34 Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo (T.Sekelj)*
34 Esperanto per rekta metodo (S.Marček)
33 Faktoj kaj fantazioj (M.Boulton)*
33 Lingvo kaj vivo (G.Waringhien)*

Vendoj unuopaj (ekz.):

50 Beletra Almanako 19
47 Beletra Almanako 20
40 Beletra Almanako 21
37 Homoj de Putin (K.Kniivilä)
21 Konciza historio de Kristanismo (G.Berveling)
20 Japana literatura juvelaro (Div. aŭtoroj)
17 Belarta rikolto 2014 (Div. aŭtoroj)
17 Poŝamiko (B.Allée & K.Kováts)
16 La Jaro (Poŝkalendaro)
15 Konvinka kamuflaĵo (T.Steele)
15 Vojaĝo en Esperanto-lando (B.Kolker)*
14 Briĝo kun veneno (R.C.Gates)
14 La Hobito, aŭ tien kaj reen (J.R.R.Tolkien)
13 toki pona en 76 ilustritaj lecionoj (E.Parra Cárdenas)
13 Antologio latina 5 (Kompilis kaj trad. G.Berveling)
13 Beletra Almanako 18
12 Telenio (O.Wilde)
12 Marina (S.Johansson)
12 Ludoviko Lazaro Zamenhof (W.Żelazny)
12 Pasporta Servo 2011 (listo de gastigantoj)*

* *Eldonaĵo de UEA/TEJO*

Gazetaraj Komunikoj de UEA

Klara Ilutoviĉ

V.M.Zeldin centjariĝis

Iuj ĝuas ĝis la centjariĝo
Resti viglaj, sen frost' en la kor'.
Iujn benas la graca feliĉo
Per la jaroj en ties favor'.

Kion fari, ke voku deziroj
Kaj fidele vervigu esper',
Ne turmentu obsedaj sopiroj
Kaj ne tordu venen' de koler'?

Kial kaptas pigreco aŭ spleno,
Kuŝigante je l' kruda invad'?
Kial evidentiĝas malpleno
De laŭŝajne bonorda vivad'?

Iuj amas, laboras kaj dancas
Preter la vivtempestoj kaj aĝ' –
Ho, al ili tutsimple bonŝancas
Pri mister' de la sortavantaĝ'!

Tamen ili aperas por io
Dum perfidoj, malsanoj, milit'!
Ĉu por ondoj de l' vivsugestio
Pri vivem' kaj pli firma spirit'?

Printempo venis

Pli frue mallumo degelas,
Maten' gaje vokas al far',
Persistan dormemon forpelas
Admiro pri lummalavar'.

Aero ekscite profetas
Briladon de varma fortun',
Kaj bonesperige ridetas
Karesa vizaĝo de l' sun'.

Insuloj de neĝ' polvogrize
Orfecas je l' muta amar'.
Burĝonoj de arboj surprize
Ekŝvelas por folietar'.

Vestaĵoj ne estas plu pezaj,
Pli ofte serenas humor',
Kaj oni sur strat' pli komplezaj
aspektas, mornec' velkas for.

Printempo junige sonoras
Pri ĝoja vekiĝ' de l' natur'.
Esperoj kaj fortoj ekfloras
Renkonte al lum' de lazur'.

Ankoraŭ kelkaj fotoj pri "la tempoj de glora SEJM"

LA 3-a LINGVA FESTIVALO EN MINSK

La 29-an de marto 2015 tre sukcese pasis en Belorusia Ŝtata Universitato la vica Minska Lingva Festivalo. La festivalo, antaŭ tri jaroj iniciatita de Anton Somin, talenta lingvisto kaj la vicdirektoro de la Moskva Lingva Festivalo, rapide evoluas, iĝante pli kaj pli riĉenhava kaj multhoma. Dum la tria MinLF ĉirkaŭ 700 homoj vizitis 50 prilingvajn lecionojn kaj lingvistikajn prelegojn.

En tiu ĉi fojo granda grupo de moskvaj esperantistoj vizitis la Festivalon en Minsk. La direktoro de la Moskva Lingva Festivalo Irina Gonĉarova salutis la Festivalon kaj rakontis, ke ĝuste antaŭ 20 jaroj, en marto 1995, en Francio pasis organizita de esperantistoj la unua en la mondo Lingva Festivalo. Tri membroj de MEA MASI kontribuis al la programo: Anastasija Golc prezentis la estonan lingvon; la talenta 17-jara interlingvisto Kuzjma Smirnov trifoje kolektadis grandegajn aŭskultantarojn rakontante pri la keltaj lingvoj, skota kaj klingona, ĉiam kun admiraj reeĥoj; Irina Gonĉarova dufoje rakontis pri Esperanto, sume al ĉirkaŭ kvindek aŭskultantoj. La publiko estis atenta, sincere interesita, reagema kaj fine multe aplaŭdis.

Ses aliaj MASI-anoj ĉeestis kiel gastoj, seninterrompe dum ses horoj vizitante diversajn programerojn. Ni ĉiuj povas atesti, ke la Festivalo pasis modele! Vivu Lingvaj Festivaloj!

Irina Gonĉarova
Direktoro de la Moskva Lingva Festivalo, kunordiganto de MEA MASI

JUBILEO… JUBILEO… JUBILEO

En la vivo de ajna persono estas iaj agoj, iaj interesoj, iaj eventoj, kiuj “trairas” lian koron kaj restas kun li por la tuta vivo. Por centoj da esperantistoj de Sovetio (ne Rusio, Ukrainio, Armenio, sed ĝuste de Sovetio!) tia evento estis SEJM-agado, agado en tiu SEJM, kiu “naskiĝis” en 1965. Jes, vere, ĉi-jare nia kara SEJM festos sian 50-jariĝon.

Kio estis la plej alloga en la SEJM-agado, entute en SEJM?

Unuavice tio estas vere amikeca etoso. Ni ĉiuj tre forte amikiĝis unu kun la alia kaj ne estis iaj kvereloj, iaj miskomprenoj, iaj ofendoj...

Krome la agaddirektoj estis tiom vastaj, tiom diversaj, ke ĉiu partoprenanto en SEJM-agado povis trovi por si vere interesan direkton. La socialisma konkurado… Ankaŭ ĝin ne indas preterlasi. Eble tiu duvortaĵo sonas ne tiom ĉarme por multaj (en Sovetio tiuperiode konkuradis ĉiuj – laboristoj, inĝenieroj ktp – do fakte preskaŭ perforte...). Sed tiu nia konkurado helpis pli racie plani nian laboron. Kaj efektive okazadis ne batalo por la poentoj, sed vera elekto de tiuj direktoj por sia agado, kiu pleje taŭgis por tiu aŭ alia E-kolektivo, iu esperantisto-unuopulo.

Kaj neniam forgeseblos ĉiujaraj Esperanto-tendaroj kaj diversaj E-renkontiĝoj – kun siaj vesperaj lignofajroj, babiladoj, eĉ enamiĝoj...

Karaj kolegoj! Karaj SEJM-anoj! Gratulojn al vi okaze de tiu 50-jariĝo!

Dmitrij Cibulevskij (Ĥarkiv, Sovetio, nun – Ukrainio)